



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
 Unu n-ro : 8 FF. Abono por 1989 kun adresaro : 40 FF.

Rekte ĝiri al pĉk-numero : 3371 74 M BORDEAUX, profite al :

Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut

(sama adreso por bankĉekoj)

POST NATURA KATASTROFO

Lundon 3an de oktobro en Nimo. En la daŭro de tri-kvar horoj fulmotondraj nuboj disverŝis pluvegon sur la urbon kaj la nordan antaŭurbon en egala denso, kiom falas en Parizo dum tuta jaro. Valetoj plejofte tute sekaj pleniĝis per impetaj torentoj. Avenuo fariĝis rivero kun ondegoj kiel du metrojn alta tajdego, kiu detruis dometojn aŭ elprenis de ili la meblaron, forportis kaj mikse frakasis veturilojn, kaj dronigis kelkajn malfeliĉulojn. Dume la Kanalo de la Fonto elbordiĝis, rompante siajn ŝtonajn parapetojn, kaj invadis aliajn kvartalojn. Post paso de tiu akva uragano la Nimanoj malkovris apokalipsan spektaklon : intermiksitaj frakasitaj aŭtomobiloj, ruinoj, stratoj plenŝtopitaj per amasoj da rubaĵoj ; en la regiona hospitala centro, multekostegaj aparatoj detruitaj, rentgenradiaj fotoj kaj ĉiaj medicinaj dokumentoj perditaj ; en nekropolo, ruinigitaj tomboj kaj pezaj tomboŝtonoj forportitaj ; ĉie fetora haladzo de hidrokarburoj, gaso kaj putraĵoj. En la plej damaĝitaj kvartaloj enloĝantoj mortis aŭ perdis sian tutan havaĵon.

Rapide miloj da fajrobrigadanoj, soldatoj, urbaj laboristoj, liceanoj kaj aliaj volontuloj aktiviĝis en bonege kunordig-

ita organizo. Centoj da transportiloj, grupoj, ŝovelmaŝinoj, pumpiloj venintaj de najbaraj kaj malproksimaj urboj trankuris la stratojn kaj efike laboris. El la Fonto estis elĉerpitaj dekoj da aŭtoj, stratoj estis malimplikitaj, keloj kaj fosoj elpumpitaj. Post apenaŭ unu semajno refunkciigis preskaŭ ĉiuj distribuaj cirkvitoj de akvo, gaso, elektro kaj telefono. Per senĉesa agado de sindonaj senlacaj laborantoj kaj mirinda solidaro la urba vivo grade retrovis sian kutiman ritmon. Multaj magazenoj reproviziĝis, urbaj organizoj kaj helpaj asocioj disdonis al ĉionperditoj botelojn da trinkebla akvo, lakto, panon, vestojn kaj kovrilojn. Meze de tiu bela impeto de helpemo, kelkaj rabistoj praktikis sian kulpan aktivecon en ruinigitaj domoj kaj en la difektita tombejo, kaj iuj fikomercistoj postulis dekoblajn prezojn por pano aŭ lakto, sed tiuj estis tre etaj esceptoj, kiuj ne povis detrui la ĝeneralan harmonion de grandanimeco. El la tuta regiono, el la tuta lando, el tuta Eŭropo alfluis mono, ja tre necesa en tiu cirkonstanco. Nimo priploras siajn mortintojn kaj pansas siajn vundojn, kiuj baldaŭ cikatriĝos dank'al ĉies helpo.

Mi pensas pri similaj kataklismoj, sed en multege pli granda skalo, en Bangladeŝ, en Sudanio, en aliaj triamondaj landoj, kiuj ne disponas tiel efikajn ekipaĵojn kaj rimedojn, kaj situas tro malproksime de eblaj helpoj. En tiaj okazoj, manke je senpera sperto, la imago tamen povas iel mezuri la plagojn de la suferanta homaro. Ni privilegiuloj ne forgesu niajn mizerajn gefratojn sur la tuta planedo.

P.S. - Mi ricevis multajn telefonajn vokojn de esperantistoj kaj aliaj amikoj, kaj telegramon de Johan-Luko Bergeon el Parizo: "Kamarado, se vi aŭ konatulo via bezonas helpon pro okazaĵoj en via regiono, kontaktu min. Plejkore." La solidaro en SAT ja ne estas sensignifa vorto. Tia konstato varmigas la koron.

VALO.

Broŝur-interesatoj bonvolu noti la baldaŭan elĉerpigon de :
 * **Lingvaj anguloj** (Baronnet) (kies reldono tamen iam eblos)
 * **Verkoj de Lanti 1** (Adamaĵoj, Absolutismo, Herezulo, ktp)
 kies reldono ne estas projektita.

**VORTOJ
DE
MALJUNULO**



VALO

EN MIA SOMERA RESTADEJO - JULIO 1988.

Dum en Nimo regas 30-grada temperaturo, ĉi tie en Florako estas ankoraŭ malvarmete. Kiam je sunleviĝo mi eliras en la ĝardeno por ĝui la vidon de la rozkoloraj rokegoj, mi tremetas. Poste, ĉirkaŭ tagmezo, la belaj sunradioj iom plivarmigas la aeron, sed nemulte.

Kiom la maljuneco moligas homon ! Antaŭ duonjarcento, eĉ vintre mi neniam timis plonĝi en malvarman riveron. Nun mi hezitas. Alveninte antaŭ semajno sub pluvo, hodiaŭ post kvar tagoj kun bela vetero, mi ankoraŭ ne kuraĝis min bani. Min trankviligas la rimarko, ke ankaŭ junulojn mi ne jam vidis en la montrivera akvo - sed ĉu tio estas valida ekskuzo ? Ĉu ne ni maljunuloj devas doni ekzemplon ? Almenaŭ tiom, kiom eble. Grimpis sur krutajn rokojn mi jam ne povus, sed naĝi kaj plonĝi estas pli facile. Krom eble se paralizite pro reŭmatismo, kiu ajn povas, se nur volas. En oftaj okazoj, en aferoj ĉu fizikaj ĉu moralaj, mankas al ni nur la firma volo.

FLORAKO, 12an de JULIO

Hodiaŭ matene mi vekigis je la 7a : duonhoron tro malfrue por vidi la reflekon de la sunleviĝo sur la dolomitaj rokegoj fronte al mia fenestro ; belega spektaklo, kies kutimeco neniam lacigas mian admiradon. Do mi hodiaŭ ĝin maltrafis. Sed tiu ĉi bela somertago rezervis al mi kompenson : la varmiginta vetero ebligis unuan banon en Tarnono, tiu montrivero, kiu, fluante de la piedo de Ajgŭalo, laŭ skista valo, pasas sub romanika unuarkaĵa ponto, strangoliĝas ĉe la Roko de la Feinoj, poste ricevas de dekstre alian cevenan rivereton (Mimento), kaj eniras en Florakon. Tie ĝi iome plilarĝiĝas en artefarita akvebeno kun plaĝeto tre ŝatata de la feriantoj. De maldekstre enfluas tre mallonga sed sufiĉe abunda rivereto (Vibrono), kiu trairas la urbeton tra pluraj kaskadoj. Du kilometrojn poste Tarnono renkontas Tarnon, kiu venas dekstre de la piedo de la granita Lozermonto, kaj baldaŭ

eniras inter du kalkaj ebenmontoj en sian faman krutvalon.

Tiun kanjonon vizitas ĉiusomere miloj kaj miloj da diverslandaj turistoj. La plimultaj komencas tiun viziton je la mezo, venante rekte de Mendo al S-ta Enimia tra la kaŭso* de Sauveterre, per aŭto. Ili estas tro rapidemaj. Mendo estas ĉarma urbeto, S-ta Enimia estas tre pitoreska mezepoka vilaĝo - eble iom tro aranĝita - kaj la dua parto de la kanjono estas la pli kurioza kaj belega, sed la unua parto estas ne neglektinda, kaj Florako havas ankaŭ sian ĉarmon.

Cetere aŭto estas tro rapida rimedo. Per ĝi kurante, oni vidas nur supraĵe kaj proksimume la multegajn mirindaĵojn trairatajn. En 1939 mi kun mia familio laŭiris ilin piede, en 1940 bicikle, nokte tendumante ĉe la riverbordo, kaj la plej krutan parton per tiuj plataj boatoj, kiujn spertaj riveranoj kondukas per longa stango. La vojo estis mallarĝa kaj zigzaga, sed maloftaj veturiloj lasis al ni ĝian tutan larĝon. Nun grandaj partoj el ĝi estas plilarĝigitaj kaj plirektigitaj - kaj tio ne plibeligas la pejzaĝon. Sur ĝi kuraĝaj gejunuloj piediras aŭ biciklas, sed ili konstante devas zorgi pri la danĝero de urĝemaj kvar- aŭ duradaj motormaŝinoj, kaj kune kun la puran aeron ili enspiradas venenajn benzingasojn. Ĉu progreso ?

Tial nun multaj naturamantoj forlasas la larĝajn vojojn, kaj preferas marŝi aŭ ĉevalrajdi sur serpentumaj vojetoj nealireblaj de motorveturiloj, kiuj rete trastrekas la Cevenan kaj Ĝevodanan regionon. Tiu vojeto reto estas speciale bone signalizita en la Nacia Parko de Cevenoj, kies ĉefloko estas Florako. Krome la Parko zorgas aŭ planas reenkondukon de malaperintaj specioj : vulturoj importitaj el Pireneoj (jam kelkaj nestas en la altaj rokegoj) ; tetraoj, cervedoj (lastan semajnon mallerta ĉasisto ĉasante apron mortigis belegan cervon kun dekdubranĉetaj kornoj) ; kastoroj, kiuj iam vivis ĉe ĉiuj najbaraj riveretoj (de tio venas la nomo de la Floraka rivereto Vibron kaj de vilaĝo Vébron ĉe Tarnono (biber = kastoro).

Plaĉas al mi tiu Nacia Parko. Ha ! se ĉio nacia estus egale utila kaj bona ! Se ni ne havus la nacian soldatservon, la nacian nuklean forton de S-roj Degol kaj Miteran, la Nacian Fronton de S-ro Le Pen, la nacian himnon de Ruĝe de Lil, la nacian flagon de Napoleono !

* kaŭso : kalka ebenmonto.

18an de JULIO

Hieraŭ estis belega vetero. Mi decidis pluki lavendon ĉe la flanko de la kaŭso. Post duonhoro da pena suprenmarŝado sub plumba suno, mia kruro kun malsanaj vejnoj doloris, mi anhelis, mi sentis mian koron forte bati, kaj mia kapo ŝajne ŝvelis pro varmego sub la ŝirmo de pajla ĉapelo. Mi haltis, elektis lokon en ombro, sidiĝis sur muskotegitan ŝtonon. Ĉu mi devos reveni neatinginte la celon ?

Kelkajn minutojn. Mi reekstaris, singarde restartis. Mi tuj retrovis la kutiman ritmon, iris per la malrapida montarana paŝado. Ĝis la sovaĝa lavendejo. Ĝi situas ĉe la piedo de la kruta ravino, kiu kondukas al la kolosaj rokegoj. Mi ekprovis kelkajn paŝojn en tiu direkto, sed mi estis piedvestita per tolaj sandaloj : pli taŭgus miaj bonaj montaraj ŝuoj. Eble kun ili mi ankoraŭ povus atingi la supron, kaj reveni laŭ la sama vojo, ĉar nun mia riparita okulo bone vidas, kien mi metas la piedojn. Almenaŭ ne hodiaŭ mi provos.

Mi do plukis bukedeton da odoraj florspikoj, zorgante ne difekti la plantojn, kaj lasi sufiĉe multajn spikojn por la vida kaj flara plezuro de eventualaj postpasantoj.

Mi revenis laŭ lastjare bone aranĝita padeto tra arbaro sur forta deklivo, meze de kiu elŝprucas kaj kaskadas la fonto, kiu fariĝas torenta rivereto tra la urbo.

Hejme malvarma duŝo mallacigis min. Mi estis kontenta pri mia ekskurseto. Sed mi antaŭsentas, ke, se mi plu vivos, baldaŭ mi devos definitive rezigni pri tiaj plezuroj, kiuj apenaŭ konvenas ankoraŭ al 88-jarulo.

Junaj geamikoj, plene profitu de via fizika forto ! Daŭrigu, kiel eble plej longe, tiajn sanigajn korpekzercojn en libera aero ! Eĉ longa vivo estas mallonga : uzu ĝin plej efike, mense kaj korpe.

22an de JULIO.

Hodiaŭ matene je sunleviĝo mi rigardis la rozkolorajn rokojn starante ne, kiel kutime, ĉe la malfermita fenestro de mia dormoĉambro, sed nudpiede sur la rohumida herbo de la ĝardeno. Hieraŭ posttagmeze, sub la varma suno, naĝado en la rivero estis refreŝiga plezuro. Ĉi-matene, mi preskaŭ tremetis en la kareso de la norda vento, kaj riskis malvarmumon. En tiu ĉi mezaltituda regiono, somero estas sezono de kontrastoj : en sama tago ĝi tiel variigas la temperaturon, ke oni povus kredi esti vojaĝinta je distanco de

pluraj centkilometroj. La vento balancas la kapon de la alta abio : ĉu ni estas en Vogezoj ? Sed tagmeze la suno intensigos la odorojn de lavendo kaj timiano, kaj eble aŭdiĝos cikado : jen ni do ĉe Mediteraneo ? Tamen la akvodislino situas kelkajn kilometrojn sudokcidente, kaj ni troviĝas en la Garona baseno : niaj riveroj fluas al Atlantiko tra Montalbano, Aĝeno kaj Bordojo ; sed la vojoj tra Cevenoj pli rilatigas nin kun Nimo kaj Montpeliero. Geografie Florako apartenas al Sudokcidenta Francio, sed etne kaj historie pli al Sudorienta. Eble pro tiu iel hibrida karaktero la ĉi-tiea popolo estas al ĉiuj malfermita kaj akceptema, sena je rasismo kaj ksenofobio. Hispanoj, Portugaloj, Italoj, Nordafrikanoj, Turkoj, montaranoj el Laosio, ĉiuj estas bonvenaj kaj baldaŭ troviĝas hejme, kaj dum la lasta granda milito Ceveno estis rifuĝejo por multaj diversdevenaj judoj. Ili trovis akcepton kaj ŝirmon en lokaj familioj tiel katolikaj kiel protestantaj. Multaj el tiuj ĉi estas fervore kristanaj, sed la religia fanatikeco, kiu iam fluigis tiom da larmoj kaj sango, estas preterlasita. Judoj, islamanoj, budhanoj kaj ateistoj estas egale konsiderataj kiel ĉiusektaj kristanoj. La Florakanoj, kiuj vidas ĉiusomere milojn da diversnaciaj turistoj, kaj gastigas diversdevenajn enmigrintojn, povus adopti la devizon de Terencio : "homoj ni estas ; nenio homa estas al ni fremda" *

* Ĉu vere de Terencio ? Mi citas laŭmemore, sed eble mia maljunula memoro lamas. Se mi eraras, bonvolu indulgi kaj korekti.

BLUA LUNHELO

Florako, 31an de julio.

Ĉi tie, neglektante la televidon, mi kutimas frue kuŝiĝi kaj ekdormi. Post noktomezo, mi, spontane vekiginte, levigias, iras en la ĝardenon kaj rigardas la ĉielon. Antaŭ du semajnoj la luno apenaŭ komencis sian unuan kvaronfazon. Malgraŭ la tro potencaj stratlumigiloj, la ĉielo estis sufiĉe malhela por lasi vidi ne malmultajn stelojn sur la blua fono. Mi rekonis la ĉefajn konstelaciojn, inter ili la belan Grandan Ursinon kaj la Malgrandan kun la Polusa Stelo, kaj salutis la belan planedon Venuson.

Ĉi-nokte la luno en sia pleno tiel heĉis, ke videblis preskaŭ neniu alia astro : krom Venera, kutima akompanantino de Selena, nur kelkaj apenaŭ brilantaj steloj. Sur la herban grundon la arboj projekciis densajn ombrojn kiel en la taga

sunhelo, kaj ĉe la supra rando de la monto la ruinformaj rokoj blanke fantomis. Post la somervarma tago, estis agrable malvarme. Mi plezure retrovis mian liton, kaj kun okulo plena de tiom da belo mi reendormiĝis. Ĝis la sesa kaj duono, kiam la matenaj sunradioj komencas orumi la rokan kronon, ĉiaman objekton de mia admiro.

Tiel, tage kaj nokte, la naturo proponas belaĵojn al kiu scias vidi ; kaj aŭdi, kun la kantoj kaj pepoj de birdetoj, la ĉirpojn kaj zumojn de insektoj, la glita brueto de rampantaj bestoj, aŭ iafoje la gruntego de la tondro, dum la fulmo desegnas sur la fono de malhelgrizaj nuboj siajn blindigajn zigzagojn ; kaj flari la odoron de la rozoj, de la lavendo, de la timiano ; kaj gustumi la nektaron de la verdaj aŭ maturaj fruktoj ; kaj palpi delikatajn formojn aŭ krude raspajn surfacojn.

Tiom da belo ! Oni volus neniam dormi, se la dorma ripozo ne estus ankaŭ ĝuo, necesa por reŝargi la akumulatojn de niaj sensoj, kaj ilin pretigi al novaj plezuroj ; kaj se ĝi ne alportus iafoje ankaŭ belajn sonojn.

Ĉiutage niajn sensojn ofendas malbelegaĵoj : ĉiumatene la gazetoj kaj ceteraj informiloj alportas sian loton da malfeliĉoj, mizeroj, teruroj, hororoj. Multaj kaŭzitaj de la homoj, kelkaj de la indiferenta naturo, kiu senkompatate dispremegas vivojn. Sed al la abomeno de katastrofoj kaj kataklismo ĝi apudmetas la konsolon de belkoloraj bildoj, de belsonaj harmonioj, de ĉiaj beloj. Nek al unuj nek al aliaj ni estu blindaj kaj surdaj.

BONA NOVAĴO

Aŭgusto 1988.

Meze de la kutimaj naturaj kataklismoj, teknikaj katastrofoj kaj abomenaj krimoj, en la lastaj tagoj la informiloj liveris al ni unu bonan novaĵon : Irano kaj Irako interkonsentis por diskuti pri eventuala ĉesigo de la milito, kiu dum sep jaroj faris milionon da mortintoj, kaj kiom da kripluloj, kiom da vidvivoj, kiom da orfoj, kiom da mizeruloj ? Dum sep jaroj sovaĝe interbatalis homoj, inkluzive de virinoj kaj infanoj, kiuj adoras saman dion laŭ instruo de sama profeto, skribita kaj legata en sama libro. Por kia rezulto ? En ambaŭ regnoj estos nenio ŝanĝita, krom la amasigitaj plagoj kaj la ekonomia ruinigado, pro la detruoj kaj la uzado de multekostaj perfektigitaj mortigiloj al ili malavare venditaj de trankvilaj komercistoj el la "grandaj nacioj".

Post kiam kompatindaj stultuloj buĉis unuj la aliajn sur la batalkampoj, fine mutiĝos la tondrado de kanonoj, kaj afablaj diplomatoj sidiĝos ĉirkaŭ tablo por pace interdiskuti. Ĉi tie ni povas citi Viktoron Hugon : "Ĉio ĉi por altecaj moŝtoj, kiuj, apenaŭ post via enterigo, interŝanĝos ĝentilaĵojn, dum vi putros."*

Altecaj moŝtoj, regnestroj kaj registoj, jes, sed alian aspekton de la afero ni ne pretervidu. Per la fabrikado de la armiloj kaj municioj, laboristoj pene perlaboris siajn vivrimedojn, kaj riĉaj mastroj pliriĉiĝis, ĉar tiu fabrikado estas unu el la plej profitdonaj industrioj. Iam kolego mia, kiu laboris en tiu industrio, diris al mi : "Tio estas ja oro, kiun ni palpaĉas!"

Ho ve ! ankaŭ mi iam partoprenis en tia fabrikado. Inter la militaj helikopteroj uzataj de ambaŭflankaj armeoj, eble kelkaj estas ekipitaj per motoroj, al kies kreado mi persone kontribuis. Vane mi obĵetus, ke samaj helikopteroj ĉiutage servas por savi homajn vivojn sur la montaroj aŭ sur la maroj. Vole-nevole, la teknikistoj kiel la sciencistoj dividas ian respondecon kun la krimuloj, kiuj misuzas la kreaĵojn de ilia laboro.

Tiel eĉ bona novaĵo povas inspiri malgajajn pensojn al pesimista maljunulo...

* Por tiuj legantoj, kiuj legas la francan lingvon, jen estas la originala teksto de V.H. :

Tout cela pour des altesses,
Qui, vous à peine enterrés,
Se feront des politesses
Pendant que vous pourrirez.

FINIĜIS LA FERIOJ.

Septembro en Nimo.

Dum tri tagoj la antikva urbo vivis en la bunta kaj brua etoso de la "Feria" de l'vinberrikolto. Sur la bulvaroj kuris nigraj taŭroj el Kamargo inter vicoj de "gardians" (bovgardistoj) rajdantaj sur siaj blankaj ĉevaloj. Sur la stratoj ludis trupoj da marŝantaj muzikistoj. Ĉie grandaj podioj kun teatraĵoj kaj dancistoj. Sur la Gardenon de la Fonto saltis de 12000-metra alto paraŝutistoj sen oksigenmasko (mondrekordo) dum sube, en la per potenca pumpilo sekigita Fonto, harditaj speleologoj esploris la tenebrajn galeriojn, serĉante la deirpunkton de la subtera rivero. Sur la areno de la romia amfi-

teatro, hispanaj kaj francaj matadoroj kontraŭbatalis ĉiu po du dikaj nigraj taŭroj el Andaluzio. Ĉie "bodegas" (hispanaj butikoj), ĉie andaluzaj gedancistoj kaj kostumitaj arlezaninoj, ĉio sub la duobla signo de Hispanio kaj Provenco. Nun la gaja bruado ĉesis, la lumoj estingiĝis, la Feria estas finita.

Finitaj ankaŭ la somerferioj. La suno ankoraŭ brilas kaj la ĉielo intense bluas, sed akra mistralo subite malvarmigis la aeron. Kelkaj flaviĝintaj folioj kirle falas. Ne estas jam aŭtuno, sed ne estas plu la varmega somero. Mi hejmen revenis, for de la freŝa rivero kaj de la aromoj de la montaraj floroj. Ĉu unu fojon plian mi revidos Florakon ? En Eŭropo sin anoncas aŭtuno, sed por mi venis jam vintro...

Nu ! for la malgajajn pensojn ! Samtempe en la suda hemisfero sin preparas nova printempo : tiun ĉi ni salutis ; kaj ni memoru, ke en iuj feliĉaj insuloj printempo daŭras tutan jaron. La naturo havas terurajn kataklismojn - vulkanojn, tertremojn, inundegojn - se ĝi prezentas ankaŭ ravajn dolĉaĵojn, kiam nur la homa stulteco ne difektas ĝin.

Jen revenas pesimismo ! Tamen ni konservu esperon. Esperon, ke, instruitaj de la scienculoj kaj alarmitaj de la "Verdaj", la homoj fine ĉesos detruiri arbarojn, damaĝi la teron, veneni la riverojn, la marojn kaj la atmosferon. Eble ne estas tro malfrue por savi nian posteularon, sed ni devas urĝi en tiu necesega tasko. Se ni sukcesos, povos esti plu agrablaj kaj ĝojaj ferioj en sana mondo.

VALO.

MONTEMO

Mi emas monti*
por ĉamon renkonti,
ne por ĉasi
kaj vendi la haŭton,
ĉar tiu problemo
nun estas mon-temo.

Mi emas monti
por plivasten horizonti
ne por uzurpi
kaj ekspluati terenon,
ĉar pro financa dilemo
ĝi ankaŭas mon-temo.

Mi emas monti
por plori kaj honti
ja pro iu kialo
ne deziras resti en valo,
ĉar mia stulta memo
ĉagrenas pro mon-temo.

* monti = esti sur monto


19860802 (1K18)

iea iu.

KRUCVORTENIGMO

Horizontale

1. Je la bona horo.
2. Evolui, progresi. - Pastopoŝo kun, interne, dolĉaĵo (s.f.).
3. Laŭdire blua ĉe kelkaj (s.f.). - Tendaro (s.f.).
4. Kapablo fari laboron. - En la mezo de templo.
5. Ingredienco de kuskuso. - Trinkilo (s.f.).
6. Fabela besto.
7. Hebrea nomo de la 5 unuaj libroj de la Biblio. - Evitinda raporto (s.f.).
8. Nacia sufikso pri Argentino. - Kvociendo de la reflektita lumkvanto per la ricevita, ĉe la reflektantaj korpoj (s.f.).
9. Brando (s.f.). - Angla biero.
10. Poseda pronomo. - Grupetoj.
11. Oni trapasas ilin ĝenerale je la mezo de la jaro.



Vertikale

1. Sen modereco.
2. Metalo, kiu zorgigas la pacamantojn (s.f.) - Mallongigo pri la aldonajoj al Fundamenta Vortaro. - Sufikso uzata por formi nomojn de tekniko.
3. Ofico, kiu malakordiĝas kun la malbeno de la Eternulo, kiam Li eligis Adamon el la Edena ĝardeno (s.f.) - Ĉu estas konsilinde ŝovi nazon en ĝin, kiam ĝi ne estas fremda? (s.f.).
4. Pli mortiga kiam ĝi estas defensiva.
5. Sufikso. - Greno malfajne muelita. - Duobligita disko (s.f.).
6. Faruno ricevita de specio de manihoto (s.f.). - Malnova unuo de termezurado (s.f.).
7. Ĉefepoko de longega historio. - Mallongigo pri fakulo. - Prepozicio.
8. Surprizigo (s.f.). - Elemento de ĉarpentaĵo.
9. Ili ornamas la florpotojn.
10. Oni ricevas tiujn surfacojn per certaj ebenaj sekcaĵoj de konuso.

Sfinksido.

- SOLVO DE L! 78 :** Hor. : 1. ORANGUTANG. 2. BIZO. KAREA. 3. STEBI. GAKI. 4. TANEJON. RN. 5. ARILO. OBEO. 6. KOS. BEKAD. 7. TROSTREĈ. 8. OLOE. KADMI. 9. KAJAKO. EON. 10. UM. GAREN. 11. REZULTATOJ.
- Ver : 1. OBSTAKLOKUR. 2. RITARO. LAME. 3. AZENISTOJ. 4. NOBEL. REAGU. 5. IJOBO. KAL. 6. UK. ESKORT. 7. TAGNOKTA. EA. 8. ARA. BARDENT. 9. NEKREDEMO. 10. GAINO. ĈINOJ.

(s.f.) = (sen finaĵo!)

"Kiam ĉiuj homoj malkaŝos la eksterordinaran povon de la amo, tio estos, en la historio de la homaro, por la dua fojo, la malkovro de la fajro."

VOJAGO KAJ MEDITOJ ĈE LA FAJREJO

Ĉiun vintran tagon, mi havas la bonŝancon ĝue kontempli, ĉe la fajrejo, la dancon de la multkoloraj flamoj kaj mi dezirus esti pentristino por kapti iliajn strangajn formojn. Mi serene rigardas la lignan ŝelon kraketi kaj transformiĝi en lumajn papiliojn, klarajn sunerojn, flagrajn luciolojn. Neniam mi kutimiĝas al tia mirinda spektaklo, kiu posedas la virtojn de magia vojaĝo. Mi gustumas la gutojn de la tempo, kaj komprenas, ke ĉiu minuto estas unika. Mi aŭdas internan, kvietigan muzikon : estas kvazaŭ mi plonĝus en silkan akvon : sekreta stelo leviĝas en mia koro kaj helaj birdoj dancas en miaj vejnoj. Mi ĝuas nekredablajn aventurojn tra la longa ruĝa valo, inter du grizaj montoj, kie staras duonruinigita kastelo.

Mia plezuro estas tiel granda, ke mi sentas mian korpon ĉe la brusta plekso malfermiĝi kiel giganta floro. Mi senmove atendas, sen scii ekzakte kion : eble revelacion, komencon plenplenan de promesoj...

"Fajro, amiko mia, ci estas mia tulipĝardeno dum la vintraj tagoj, la lumo, kiu disŝiris la malhelon por veni alporti la vivon. Ci estas ĉeesto, kiu dolĉigas la solecon, naskas intimajn revojn, dialogojn kaj rakontojn, favoras la amikecon. Varmiga, ĝojiga fajro, kiu estas ankaŭ la ĉarmo kaj la protekto de la bivako, mi aŭskultas cin murmuri, kanti, kvazaŭ mi aŭskultus raran birdon. Ci neĝigas mian ĝojon kaj delikate mi frandas ĝin..."

Tamen, dum mi ege ŝatas mian komfortecon, mi ne povas ignori la malbonefikojn de fajro. Se ĝi estas la simbolo de la purigado, spiriteco, de la diversaj pasioj, unuvorte de la vivo, ĝi bedaŭrinde estas ankaŭ la simbolo de la morto : Auschwitz, Hiroŝima, Ĉernobil, Incendioĝoj...

Ekzistas ankaŭ la flamoj, per kiuj nutriĝas la varmega blovo de la ribelo, malkonkordo, de la envio. Ekzistas precipe la abomena fajro de la milito.

Sed la vivo ĉiam renaskiĝas el siaj cindroj ; kiel la fenikso, legenda birdo.

Dum la fajro verŝas en la sidĉambbron sian lastan kison de helo, mi pensas pri la flamo, kiun vi ĉiuj Esperantistoj

lumigis en mi. Mi fervore klopodos, por ke tiu ardo neniam estingiĝu. Ĝismorte, mi deziras konservi en mia koro la torĉon de niaj pacaj kaj fratecaj ideoj.

Michèle Freud.

NAW-RUZ en LOME (Togolando)

Estis la semajno, kiu antaŭis la festo-tagon. El mia radio-ricevilo estis aŭdiganta: "La komunumo Bahaa de Lome informas la Bahaanojn kaj la interesigantojn pri tiu kredo, ke la festo pri la nova jaro Bahaa okazos dimanĉon, la 21an de marto 1988 je la oka vespere ĉe la Bahaa centro de Lome". Ni iru tien, mi pensis, ĉar mi neniam ion tian partoprenis.

Dimanĉo la 21a de marto fulme alvenis. Tiam devis okazi kunveno de UTE, nia landa E-asocio. Unu tagon antaŭe, min vizitis la prezidanto de UTE, s-ro ATTIOGBE-AGBEMADON. "Tiu vesperon ni festos kun samkredantoj, mi aŭdis la informon, ni iru tien". Jes, mi respondis, ni iru tien. Estis por mi la unua fojo celebri tian feston. Jam je la oka, ni estie tie, min akompanis interesiganto pri la kredo, s-ro AGBOLO Messan, esperantisto, kiu scias pri la kredo antaŭ ol esti de mi esperantistigita.

La antaŭo de la centro estis tute plena je veturiloj, motorcikloj, ktp. Kie la enirejo? Ĝin kaŝis veturilo de usonano. La unueco de la homaro tie vidiĝis.

Ĉio jam estis preta je duono post la oka, kiam geknaboj devis kanti. Antaŭe, ni tri estis invititaj de iu eksidi, kaj tiam ni devis malliberigi la seĝojn starantajn ĉe la unua vico. Kaj kio poste?

"Karaj, Alaŭaba. Hodiaŭ ni festas Naw-Ruz, simbolantan ankaŭ la finon de nia deknaŭtaga fasto. Tuj okazos unue la spirita parto kaj poste la socia de nia diservo", devis anonci france kaj evee (eve estas nacilingvo) barbulo. Ni devis tiam aŭdi sep preĝojn deklamitajn france kaj unu evee kaj alian preĝon kantitan arabe de arabino. Post tio devis sekvi kantado far la geknaboj, kiu finis tiun parton. La socia parto konsistis el rakonto de anekdotoj, ludado kaj manĝado. Mi memoru pri unu el la anekdotoj:

"Temis pri viro duone malsaĝa, s-ro X... Li petis de sia amiko, s-ro A..., ke li akompanu lin viziti aliajn amikojn. S-ro A... ne volis, ĉar li ne havas taŭgajn vestojn, li devis klarigi al sia amiko X... - Ho, ne zorgu, mi

pruntos al vi mian mantelon. Kaj ili devis ekvoji al la du vizitotaj amikoj. Ĉe la unua, ili tie restis, babiladis, kaj kiam ili devis foriri, S-ro X devis diri: "Mia amiko, mi forgesis prezenti al vi mian akompananton; li estas mia amiko, S-ro A..., sed estas mia la mantelo, kiun li surportas." Survoje al la dua amiko, S-ro A... devis riproĉi sian amikon pro la diro pri la mantelo kaj ekdecidis reiri hejmen. Tiam S-ro X... petis pardonon de sia amiko, ke li ne parolu plu pri la mantelo. Ĉe la dua amiko la gastoj babiladis iom da tempo kaj kiam ili devis foriri, S-ro X... devis eksalti: "Kara amiko, mi forgesis ion, mi ne prezentis al vi mian akompananton; permesu, ke mi faru tion. Li estas S-ro A..., mia plejamata amiko, sed ĉi-foje mi ne parolu plu pri la mantelo." "

La etoso estis familia. Ni manĝis kukojn, macojn, arakid-nuksojn, fruktojn, kaj trinkis fruktosukojn. Tiun parton prizorgis usona paro. Neniu diferenco sentiĝis inter la togolandanoj, la usonanoj kaj la araboj kaj la eŭropanoj; tio montras, ke la interfratiĝo celita de la Bahaanoj plene realiĝas.

Kiel simpla, senetiketa, sentemporaba, ktp. estis tiu festo! Ĉiuj plenanime partoprenis tiun feston, je kies fino ni devis kapti la okazon paroli kun membro de la loka asembleo pri la baldaŭa paŝo de nia landa E-asocio.

ANTAŬEN IRU KAJ TRIUMFU ĈIU ISMO CELANTA INTERFRATIĜON KAJ MONDPACON!

GBEGLO Koffi

AVENTUROJ KUN HUNDO

Mi loĝas en urbo nomata Valentin Alsina, kiu limas kun urbego Buenos Aires; mia loĝejo troviĝas je apenaŭ 10 stratoj de Buenos Aires, sed ĝi ne estas Buenos Aires.

Nu, fronte al mia domo sur strato Itapiru troviĝas magazeno kaj en tiu magazeno estas hundo nomata "Poroto". Tiu ĉi "Poroto" estas la plej bona, milda kaj amikema hundo, kiun iam mi vidis kaj traktis en mia vivo. (Kaj mi skribas "traktis", ĉar multfoje mi karesis ĝin).

Sed jen kio okazis en iu vespero.

Mi revenis de miaj aferoj portante pakafeton en la mano kaj mia amiko "Poroto" troviĝis fronte al mia loĝejo side sur sia postaĝo, trankvila, eble memabsorbata, pensante en sia hunda vivo.

Mi stumblis sur ŝtono, falis kaj la pakafeto fortiriĝis el

mia mano kaj iris frapi "Poroto"n, kiu forkuris terurigita kun la vosto inter la gamboj. *Bonsance* mia persona damaĝo ne estis granda : nur vundeto en la manplato kaj disŝiritaĵo sur la pantalono.

Eble vi pensas, ke tiu ĉi aventuro kun hundo estas senvalora, eĉ stulta ; sed la historio havas interesan kaj instruan konkludon. Bonvolu do, ne turni la paĝon kaj daŭrigu legadon.

Ĉar okazis, ke en la sekvanta tago, kiam mi eliris el mia loĝejo, tiu hundo bona kaj milda, ĉe mia ekvido, rigidigis la voston kaj kuris al mi kun la malbona intenco ataki min kaj bojante en maniero ne priskribebla.

La bona, milda kaj amikema "Poroto" konsideris, ke mi atakis lin kaj komencis vidi en mi "malamikon".

Konkludo. Povas okazi, ke vi per vortoj, gestoj aŭ alimaniere vi diris aŭ faris ion tute senintence, kion iu el viaj kunhomoj interpretis malbone kaj ofenda al li kaj ekde tiu momento tiu kunhomo komencis "malameti" vin.

Per vortoj kaj agoj tute senintencaj, hazardaj, ni povas ofendi iun ajn - kial ne vian edzinon aŭ edzon ? -, ĉar li aŭ ŝi misinterpretis tion.

Tial se vi vidas, ke iu kondutas al vi ne kiel kutime, rakontu al li, kio okazis al mi kun "Poroto" : kaj la afero klariĝos.

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj !

A. Lopez Luna

Edgard JAMART :

Edipo, Freŭdo kaj incesto

Kiam Freŭdo sin turnis al la fama antikva dramo de Sofoklo por doni la nomon "Edipo" al la komplekso, kiun li estis ĵus malkovrinta, li tuj ekstraktis la misteran kaj teruran problemon de incesto, ne nur por siaj samtempuloj sed ankaŭ por la posteularo.

Verdire, incesto estas tiel aĝa kiel la homaro, sed nur nuntempe iomete post iomete oni kuraĝas paroli pri tiu tabuo.

Oni ofte misuzis tiun nomon de Edipo !

Roberto Escarpit, franca aŭtoro, skribis jenon : "Patro neniam havas multan ordonpovon sur siaj infanoj, kaj iun tagon la murda gesto de Edipo estas simbolo farota kontraŭ lin."

Kial paroli pri tia abomena ago, eĉ simbolo, pro ia patra

malforteco ? Se tia estus la kazo, ne estus necese lukti por faligi la patron kaj proprigi al si la patrino : sufiĉus la nura armilo de malestimo !

Freŭdo asertis, ke la filo devas mortigi la fortan patron, kiu estas la amanto de la patrino kaj la barilo al lia perfekta kaj ekskluda unuiĝo kun ŝi.

Sed ankaŭ regema patrino povas naski samajn simptomojn.

Ni konstatas, ke la Viena psikiatro prenis antikvaĵon por nomi ĝin komplekson, sed la malsimileco inter ambaŭ estas okulfrapa ! Ne forgesu, ke se psikologio kaj psikiatrio esploras la fenomenon subkonscio, Edipo sciis nenion pri ĝi, des pli ke li ankaŭ nesciis siajn familiajn rilatojn, kiam li fariĝis murdisto kaj incesta filo.

Poste, kiam li konis la veron, li abomenis siajn agojn kaj li blindigis sin. La grava peko ne estis la murdo al lia patro, sed precipe la intimaj rilatoj de la filoj kun la patrino : incesto estis abomeninda krimo en la antikva Grekio.

Kurioze, en la sama epoko, tiaj dubasencaj rilatoj estis alte taksataj en Egiptio, almenaŭ ĉe la kortego, verŝajne sen apero de sekvaĵoj fizikaj aŭ psikaj, tiaj, kiaj ili estas nun timataj.

Memoru ni la patriarkon Loto-n, kiun liaj filinoj ebriligis por kuŝi kun li. Sen tia farado kaj sen posteularo, ili estus vane savitaj de l'detruo de Sodomo kaj Gomoro.

En la XIII-a jarcento, la kristana pensulo Johano Duns Scot asertis aŭdace, ke Dio povas permesi poligamion aŭ inceston kiam necese.

Tamen, timo de l'incesto estas ĉiam vigla sur la mondo, eĉ pli ĉe iuj primitivaj triboj, kiuj preskribas severan ekskludon kaj mortpunan tiujn, kiuj havas incestajn rilatojn.

Tiaj naturaj leĝoj ne rezultas de agoj rilate al la fama komplekso. Vivo kaj edukado de tiuj popoloj malhelpas, ke tiuj ĉi povu eble suferi konscie aŭ ne pro ĝi. La malpermeso celas pruvi la filecon de la infanoj, malhelpi dangeŝajn konkuradojn kaj firme teni la familian ĉelon.

Pli kaj pli oni malkovras la inceston en Okcidento. Mi ne scias, ĉu la kaŭzintoj konas mempropon, sed ofte, tre ofte, la viktimoj daŭre plendas. Kompreneble malriĉeco kaj ŝoka mikseco instigas al malbonfaroj, sed je tiu nivelo, ĉu ni povas elvoki la vorton mem "konscio" ?

Kelkaj landaj leĝoj antaŭzorgas aborton pro incesto, sed mi demandas min : por helpi kiajn personojn ?

Oni povas diri, ke incestaj rilatoj estas ofte malfacilaj, dubasencaj; ili estas malofte ekkonfidotaj pro timo de la

justico, kiu povos neniigi ĉiujn familiajn ligilojn.

Ĝenerale, kiam oni parolas pri la komplekso de Edipo, oni pensas nur pri la rilatoj inter la filo kaj la patrino. Freŭdo entutigis la saman fenomenon, kiam li videtis la rilatojn inter la filino kaj la patro. Tamen tiuj ĉi lastaj nomiĝas ĉefe "komplekso de Elektro", laŭ alia tragedio de Sofoklo.

Ordinare oni resumas per la malfacilaĵoj inter la filo kaj la patro, kaj lia korinklino al lia patrino. Edipo kuŝis kun sia patrino. Verdire dum la kutima vivo, tiu fakto estas multe pli malofta ol seksaj rilatoj inter patro kaj filino. Tiuj inter gefratoj ŝajnas malpli dramaj, ĉar juneco permesas sendube pli facilajn pardonon kaj forgeson.

Foje, malfacilaj rilatoj inter familianoj estigas murdojn. Junio de 1985, mi notis jenajn komentojn pri proceso en asizo de Bruĝo (Belgio) de filo mortiginta sian patron :

- Certe, ja, ne ekzistis akordo. Ĉu estas eble lima aĝo je kunvivado de generacioj en urba kvartalo ? Ambaŭ loĝis en domo de la centro de Bruĝo. La patro volis, ke la filo foriru. Atestoj montris la tiranecon de la patro... sed ĉu necesis mortigi lin ?"

*
* *

En la fino de la XX-a jarcento, multaj tabuoj estas malaperintaj. Oni povas sin demandi, ĉu Freŭdo estas ankoraŭ aktuala, kiam oni ekzamenas faktojn, kiuj influas la definitivan rezulton de la homa konduto.

Jes, estas ĉiam sadismaj patroj, kiuj edukas siajn gefilojn laŭ siaj subpremoj, sama junula eduko kaj religio ! Jes, estas ĉiam patrinoj superrajtaj, kastrantaj, posedemaj !

Tamen tio estas precipe karakterizaĵo de okcidenta civilizacio. La malsanuloj psike subpremitaj de Freŭdo devenis de la burĝa medio de Vieno.

La rilatoj inter gepatroj kaj gefiloj fariĝis pli konfidaj dum tiuj ĉi jaroj ; oftaj estas la kazoj de kompleksaj gepatroj kontraŭ iliaj infanoj !

Resume, oni povas aserti, ke amikaj kaj konfidaj sentoj anstataŭas nun supermezuran aŭtoritaton. Sekso ne plu estas la antaŭa malpura afero kaj la knabo ricevas adekvatan instruon.

Kaj se problemoj plu ekzistos, ne malkuraĝu : multaj psikologoj kaj psikiatroj helpas nin !

Johano-Paŭlo Sartre ne konis tian problemon : li estis feliĉa pro la frua morto de sia patro kaj pro tio li ne plu

devis batali lin !

Ofte, homo deĵetas ĉiujn formojn de aŭtoritato : tiujn de la dieco, de la Patro, kiun li preĝis en la "credo" ; de la despota papo, de la diktatoro, de la estro : ĉiuj ili prezentas la bildon de la patro malamata.

Pure kaj nure, oni povus sin demandi, ĉu la ĉi-supraj sentoj ne estas amalgamo de fundamentaj instinktoj, kiel agresemo kaj avido ?

Pluraj psikologoj opinias, ke kulturo pli influas la personon ol la seksaj interesoj. Laŭ ili, la komplekso de Edipo estas kondiĉita pli pro la familia ĉelo kaj la ĉarmo de la gepatroj ol pro biologia denaskeco, kiel Freŭdo argumentis ĝin.

Harry Stack Sullivan, usona psikiatro, konsideras skeptike kaj science la faman Freŭdan komplekson.

En 1960, Petro Daco eldonis la libron : "Mirindegaj venkoj de psikologio", laŭ tradiciaj teorioj. Post dudek jaroj li eldonis : "Mirigaj vojoj de la nova psikologio". Tiam li skribis ke la tradiciaj kriterioj estas malaperontaj kaj ke ĉiu devas eksperimenti nun novajn valorojn, kaj la MEMKONO FARIGAS ESENCA.

MIA KRISTNASKA ABIO

*Mi elektis belan Vivarbon
Kiun mi enradikigis
En la homkoron.
Mi plektis girlandojn
Per la fadenoj de la boneco
Kaj la biletaĵoj de la komprenemo.
Mi pentris stelon
Per la esperkoloro.
Rigardu ĝin heli
Per siaj mil ĝoŝlumo,
Aŭskultu ĝin kanti
Siajn mil amrekantaĵojn.
Prizorgu ĝin serioze,
Ĉar ĝi nur deziras vivi
Mia Arbo de la Paco...*

Michèle Freud.

Bertolt Brecht :

La paketo de l' kara Dio

kristnaska rakonto

Prenu viajn seĝojn kaj teglasojn ĉi tien posten al la forno kaj ne forgesu la rumon. Estas bone, se varmas, se oni parolas pri la frido.

Kelkaj homoj, antaŭ ĉio certa speco de viroj, kiuj ne ŝatas sentimentalon, havas fortan antipation kontraŭ Kristnasko. Sed almenaŭ unu kristnaskon en mia vivo mi vere tre bone memoras. Estis la kristnaska vespero 1908 en Ĉikago.

Mi venis komence de novembro al Ĉikago kaj tuj oni diris al mi, kiam mi informis min pri la ĝenerala situacio, ke venos la plej kruela vintro, kiun tiu ĉi, jam sen tio sufiĉe malagrabla urbo, povos ebligi. Demandante, ĉu mi bonŝancus kiel kaldronforĝisto, oni diris al mi, ke kaldronistoj ne havas ŝancon, kaj kiam mi serĉis almenaŭ iom akcepteblan dormlokon, ĉio tro multekostis por mi. Kaj tion multaj spertis en tiu vintro 1908 en Ĉikago, el ĉiuj profesioj.

Kaj la vento blovis abomene el la direkto de la Michigan-lago, dum la tuta decembro, kaj fine de la monato aldone kelkaj el la grandaj viandaj pakentreprenoj finis la laboron kaj ĵetis tutan torenton da senlaboruloj sur la fridajn stratojn.

Ni trotis dum la tagoj tra ĉiu urbokvartalo kaj serĉis malespere por iom da laboro kaj ĝojis, se vespere ni povis trovi lokon en iu eta, kun lacaj homoj ŝtopita, gastejo, en la buĉfabrika kvartalo. Almenaŭ varmis tie kaj ni povis sidi trankvile. Kaj ni sidis tiel longe, kiel eblis iel, kun unu glaso da viskio, kiu inkludis aldone la varmon, la bruon kaj la kamaradojn, ĉion, kio je espero ankoraŭ ekzistis por ni.

Tie ni sidis ankaŭ kristnaskvespere de tiu jaro, kaj la gastejo eĉ pli troplenis ol kutime kaj la viskio eĉ pli akvecis kaj la publiko eĉ pli malesperis. Estas klare, ke nek la publiko nek la gastejĉefo envenas festhumoron, se la tuta problemo de la gastoj estas tio, per glaso elteni tutan nokton, kaj se la tuta problemo de la gastejĉefo estas tio, elkonduki tiujn, kiuj havas vakajn glasojn antaŭ si.

Sed ĉirkaŭ la deka envenis du aŭ tri uloj kiuj, diablo sciu de kie, havis kelkajn dolarojn en poŝo, kaj tiuj invitis la tutan publikon, ĉar ja kristnasko estis kaj sentimentaleco ŝvebis en la aero, trinki kelkajn ekstrajn glasojn. Post kvin minutoj la

tuta gastejo ne rekoneblis.

Ĉiu iris por preni freŝan viskion (kaj nun nekredeble precize atentis pri tio, ke oni tute ekzakte enverŝu), oni kunŝovis la tablojn, kaj froste aspektantan knabinon oni petis, ke ŝi dancu Cakewalk-on, dum kiu ĉiuj aliaj festpartoprenantoj manfrapis la takton. Sed kiel mi diru, eble la diablo havis manon en la ludo, festa humoro ne volis ekesti.

Ja, tuj dekomence la festo alprenis rekte malican karakteron. Mi pensas, ke estis la devigo akcepti la donacojn, kio tiom ekscitis ĉiujn. La donacintojn oni ne rigardis per afablaj okuloj. Jam post la unuaj glasoj de la eldonita viskio oni forĝis la planon, aranĝi ververan transdonon de donacoj, por tiel diri : entreprenon de granda stilo.

Ĉar superfluo de donacartikloj ne estis, oni volis donaci malpli da efektive valorplenaj, sed pli da tiaj donacoj, kiuj konvenas por la pridonacotoj, kaj havu eble eĉ iun kaŝitan sencon.

Tiel ni donacis al la gastejĉefo ĉampanujon kun kota neĝakvo de ekstere, kie ĝuste sufiĉe da ĝi estis, por ke lia viskio ne elĉerpiĝu ĝis en la novan jaron. Al la kelnero ni donacis oldan rompitan ladskatolon, por ke li havu almenaŭ unu decan servicopecon, kaj al knabino apartenanta al la gastejo ni donacis poŝtrancilon kun difektita eĝo, por ke ŝi almenaŭ la pudrotavolon de la pasinta jaro povu forgrati.

Ĉiujn ĉi donacojn la ĉeestantoj, eble nur kun escepto de la pridonacitoj, aplaudis en provoka maniero. Kaj tiam estis tempo por la ĉefamuzo.

Nome estis inter ni viro, kiu certe havis tiklan punkton. Li sidis ĉiun vesperon tie, kaj personoj, kiuj spertis pri tiaj aferoj, kredis kun certo povi aserti, ke, kiom ajn indifereinte li ŝajnis sin, li devis havi certan nevenkeblan evitemon kontraŭ ĉio, kio rilatis la policon.

Sed ĉiu homo povis vidi, ke li ne enestis en bona haŭto. Por tiu ĉi viro ni elpensis ion tute precipan. El olda adreslibro ni elŝiris kun la permeso de la gastejĉefo tri paĝojn, sur kiuj troviĝis amaso da policstacioj, volvis ilin zorge en gazeton kaj transdonis la paketon al nia viro.

Ekis granda silento, kiam ni transdonis ĝin. La viro manprenis hezite la paketon kaj rigardis nin per iom kalka rideto de sube supren. Mi rimarkis, kiel li fingre palpis la paketon por ekscii jam antaŭ la malfermado, kio povas esti en ĝi. Sed tiam li rapide malfermis ĝin.

Kaj nun okazis io tre stranga. La viro manipulis ĝuste la ŝnuron, per kiu la "donaco" estis ĉirkaŭŝnurita, kiam lia rigardo, ŝajne senatente, sur la gazetfolion trafis, en kiun ni metis la interesajn adreslibropagojn, sed tiutempe lia rigardo jam ne plu senatentis. Lia tuta maldika korpo (ĝi tre longis) por diri tiel, kurbiĝis ĉirkaŭ la gazetpaĝon, li klinis sian vizaĝon profunde sur ĝin kaj legis.

Neniam, nek antaŭe nek poste mi vidis legi tiel homon. Li simple glutis avide la legatan. Kaj tiam li suprenvidis. Kaj denove mi neniam antaŭe nek poste vidis viron tiom radiante rigardi, kiel tiun viron.

"Jen mi legis ĝuste en la gazeto" li diris per rusteca pene trankvila voĉo troviĝanta en ridinda kontraŭdiro al ĝia radianta vizaĝo, "ke la tuta afero simple jam delonge estas klarigita. Ĉiu viro en Ohio scias, ke mi ne havis la plej etan rilaton al la tuta afero." Kaj tiam li ridis.

Kaj ni ĉiuj, kiuj staris mirigite ĉe li kaj atendis ion tute aliaj kaj komprenis preskaŭ nur, ke la viro estis kulpigita iel, kaj intertempe, kiel li ĵus eksciis el la gazetpaĝo, rehabilitita, komencis subite kunridi plengorĝe kaj preskaŭ el la koro, kaj tiel venis granda elano en nian aranĝon, la certa amareco estis plene forgesita, kaj iĝis bonega kristnasko, kiu daŭris ĝismatene kaj kontentigis ĉiujn.

Kaj ĉe tiu ĝenerala kontentigo estis kompreneble jam tute egale, ke tiun gazetpaĝon ne ni elserĉis, sed Dio.

tradukis **Hagen Hirte**, 3.11.87

MAZDAĴETOJ

Strange...

Dolĉas ŝia korpo,
dolĉas ŝia buŝo,
sed mi dirus eĉ pli :
la plej dolĉa tamen
estas penso pri ŝi...

Senspertulino

Ŝia granda eraro
troviĝas nur en tio,
ke ŝi vidas la amon
en ĉiu simpatio.

En iu lando

Mia propra opinio ?
Mi iru demandi
pri tio
al mia partio...

En iu aĝo

Se postkvardekjarulo
vekiĝas sen doloro,
signiĝas - bedaŭrinde -
ke nepras jam pastoro.

La plej dolĉa ripeto

Kaj gaje al mi,
al mi tre ĝoje,
kiam ŝi flustras :
"Ankoraŭ foje!"

xxx

Ne estas laŭ mia plano
enlitiĝi de malsano,
sed la plej dolĉa laboro
enlitiĝi pro amoro.

Kion tio signiĝas ?

Ne estas al mi
aferoj evidentaj,
ke virinoj sin sentas
ĉe mi - inteligentaj.

Logo

Ĉiam mi sentas ĝuon
Vidante ŝian genuon.

Estas tia ludileto

Al amoro,
al amuzo
"nur por la interna uzo!"

La tabuoj

La tabuoj estas
pli fortaj ol ni...
kaj kontraŭstarigi
povas nur geni!...

Kunekzisto

La vera amo
kuniras kun doloro,
kaj vera amoro
ofte kun pudoro.

Garantiita virto

Ne plu eblas dubi
pri ŝia virgeco !
Multfoje kontrolita...
Ĉiam kun apreco...

Kaj tamen

Aŭdacaj pensoj
miaj estas
eĉ tiam, se
ŝi nur modestas.

Grava indiko

Ne estas problemo kun ŝi
vespermanĝi serene,
estas tre malfacile
toleri ŝin matene.

Al viro...

Al viro la plej granda
klopodo kaj malbono
kiam nadleto montras
la kvinan kaj duonon.

Provu, mia belulino

Senkaŝe jen mi deklaras:
en amo mi malavaras.

Mi ne scias

Ĉu tiel nomata
mia sfero privata
ne estas kontrolata
de milico ŝtata ?

Seneliro

Anstataŭigi amon ?!
Per kio ? Per viskio?
Per sutano? Korano?
Per granda fam' ??
Neniam!...

El "LIBERIĜI EL TIO KONATA"

de Jiddu Krishnamurti

"... Aspiri al sekureco en niaj interhomaj rilatoj nepre signifas vivi en sufero kaj timo. Tiu aspiro al sekureco estas kvazaŭa invito al malsekureco. Ĉu vi iam trovis certecon en viaj interhomaj rilatoj ? Ĉu ĝin vi trovis ? Ni deziras tiun trankviligon, kiam ni amas kaj deziras, ke oni reciproke amu nin ; sed ĉu du personoj povas ami unu la alian, se ĉiu el ambaŭ serĉadas sian propran sekurecon laŭ sia propra vojo ? Oni ne amas nin, tial ĉar ni ne scipovas ami.

Kio estas amo ? Tiu vorto estas tiel misuzata kaj koruptita, ke mi apenaŭ kuraĝas ĝin prononci. Ĉiuj parolas pri amo : ĉiuj periodaĵoj, ĉiuj gazetoj; kaj la misiistoj parolas pri eterna amo. "Mi amas mian landon, mi amas mian reĝon, mi amas tian libron, mi amas tiun montaron, mi amas la plezuron, mi amas mian edzinon, mi amas Dion..."... Ĉu amo estas ideo ? Ĉi-kaze oni povas ĝin kultivi, ĝin nutri, ĝin flegi, ĝin disvolvi, ĝin misformi ĉiumaniere.

Kiam vi deklaras, ke vi amas Dion, kion tio signifas? ke vi amas projekciaĵon eligintan el via imago, projekciaĵon el vi mem, vestitan per speco de respékto, konforma al tio, kion vi kredas nobla kaj sankta. Diri "Mi amas Dion" estas absurdaĵo. Adori Dion, tio estas adori sin mem, tio ne estas amo.

*

Ĉar ni ne trovas solvon al la interhoma amo, ni uzas abstraktaĵojn. La amo ja povus esti la fina solvo al ĉiuj interhomaj malfacilaĵoj, al iliaj problemoj, al ilia malĝojo, sed kielfari, por scii tion, kio ĝi estas ? Ĉu ĝin difinante? La Eklezio difinas ĝin iel, la socio aliel, kaj krome estas ĉiuspecaj deviaĵoj kaj perversoj : adori iun, amori kun iu, interŝanĝi emociojn, kunvivi, ĉu tion ni nomas amo? Jes ja, kaj tiuj nocioj estas bedaŭrinde tiel personaj, tiel sensaj, tiel limigitaj, ke la religioj kredas sin devigataj proklami la ekziston de transcenda amo. En tio, kion ili nomas la homa amo, ili konstatas plezuron, ĵaluzon, deziron arogi, posedi, kapti, superregi, interveni en alies

penso, kaj, vidante tiun tutan kompleksecon, ili asertas, ke ekzistas alia amo, dia, subluma, nerompebla, nepoluata.

Sanktuloj, ĉie en la mondo, asertas, ke rigardi virinon estas malbone ; ke neblas proksimiĝi al Dio, se oni trovas plezuron en seksaj rilatoj ; kaj, tiel, ili repelas siajn dezirojn, kiuj voras ilin. Neante la seksecon, ili ŝtopas al si la okulojn kaj fortiras la langon, ĉar ili neas la tutan belecon de la tero. Ili malsatigis sian koron kaj sian spiriton. Ili estas sklerozigintaj, ili forpelis la belecon, tial ĉar la beleco estas asociita kun la virino..."

esp-igis : Kribo.

Aŭtodidakto, presisto, laborista verkisto kaj esperantisto

Ion CAPATANA (Kapatana)

Ion CAPATANA naskiĝis en j. 1915 en Bukareŝto (Rumanio) en malriĉa familio. Kiam li aĝis nur 11 jarojn, li devis labori. Li tamen lernis esperanton kaj fariĝis sekretario de la E-movado en Bukareŝto, kie li prizorgis la revuon "**La vegetarano**" esperantlingve. Pro la diktaturo li devis foriri al Bulgario.

Ĉar la lando de Voltaire (Volter) allogis lin, Ion Capatana alvenis en Parizon preskaŭ senmone. Li tamen pluvivis dank'al la helpo de sia amiko la verkisto Panaĭt ISTRATI. En la suda Francio li kontaktis la hispanajn rifuĝintojn, kiuj fuĝis la Frankismon. Reveninte en Parizon, li presis por la hispanaj esperantistoj "**La Liberecana Sintezo**" kaj samtempe gvidis E-kurson, ĉeestis prelegojn kaj kursojn en Sorbono kaj Muzeo de la Homo.

Aĉetinte malnovan lignan domon, ĝardenon kaj presmaterialon, li eldonis la revuon "**La kajeroj de la Artistokratio**" kvarlingve : france, rumane, hispane kaj esperantlingve. Ion Capatana donis al si kiel tujan taskon la defendon de Panaĭt ISTRATI kalumniata fare de la stalinistoj post la apero de la libro "**Al la alia flamo**", kiu kritikis la situacion en Sovetio. Post 16-monata restado Capatana verkis kaj presis broŝuron "**Panaĭt Istrati, la homo kiu aliĝas al nenio**".

Poste, li presis ankaŭ diversajn poemarojn kaj librojn, pluvivante nur en malriĉaj kondiĉoj.

Li mortis en j. 1943 pro akcidenta veneniĝo. Nekonatoj disrabis la malnovan domon, forprenante paperon, librojn kaj presmaterialon.

Jen estis kelkaj linioj por rememorigi tiun malbone konatan esperantan aktivulon kaj liberan homon.

J.G.

23

Kiel defion al la legantoj de **Laŭte!** mi proponas jenan

ludon de la cent vortoj :

La celo de la ludo estas skribi historieton, sufiĉe interesan por ne enuigi la leganton, sed uzante la plej malaltan nombron de morfemoj (t.s. radikojn aŭ afiksojn). La terminaĵoj (o a e i u as is os j n) ne estas enkalkulitaj. Kiel ekzemplo, mia rakonto uzas tiujn CENT UNU VORTOJN :

Pronomoj

mi li ŝi ĝi ni vi ili / iu kiu io kio tio

Afiksoj :

mal re / ej in iĝ ig ebl / it

Substantivoj :

homo viro sinjoro amiko afero mono hejmo novelo vorto tago horo

Artikolo : la

Adjektivoj :

kia / alia bona bela granda juna / unu du tri cent

Adverboj :

multe / nun for ankaŭ tre nur jes ne ĉu / kie tie kiel kial

Prepozicioj :

el al ĝis post antaŭ en kun por pri pro de

Konjunkcioj :

kaj sed ke ĉar se aŭ

Verboj :

esti havi voli devi povi iri veni fari
danki pardoni demandi peti ami koni paroli diri scii
manĝi trinki loĝi vivi farti skribi doni ami respondi
helpi saluti vidi

L! red.humile petas ĉies indulgon !

Pluraj legintoj rimarkis kaj rimarkigis la mankon de akuzativo en la frazo : "Obei la diecon kaj liaj(n) reprezentantoj(n) estas sklaveco kaj morto." (L! 78, p.14, fine de la artikolo de E. Jamart). Gratulon al ili! Honton al la sisteronema* Kribo !

* Nu, kiu rakontu al ni pri la sisterona akuzativo ??

CENT VORTOJ

Iun tagon, mi eliras el la laborejo, kaj kiun mi vidas antaŭ mi ? Junan kaj belan virinon...

Ŝi vidas min. Mi vidas ŝin. Mi iras al ŝi.

- Saluton!

Ŝi ne respondas.

- Kien vi iras ?

Dua nerespondo.

- Pardonon. Mi ne volis...

- Ĉu mi povas helpi vin ? Ŝi diras.

- Ee... ne... dankon!

- Nun, ĝis revido !

Kaj ŝi foriras kaj mi vidas ŝin foriri. Mi ne scias kiu ŝi estas, sed ŝi estas bela kaj mi volas revidi ŝin...

Sed mi ne scias kion fari. Post tri tagoj, ree mi eliras el la laborejo kaj, kiun mi vidas ? Amikon el miaj, kiu volis vidi min. Ni salutas nin. Li diras al mi : "Ĉu ni trinku ?" kaj mi diras jes, kaj ni iras kune en trinkejon, por trinki, sed ankaŭ por paroli.

Tie mi diras al li kion mi faris. Mi parolas al li pri la bela virino kiun mi vidis, kaj diras al li kie ŝi estas. Ĉu ŝi estas ankaŭ granda ? li demandas. Ne tre, mi diras. Mi scias kiu ŝi estas, li diras. Mi vidis ŝin.

- Ĉu vi konas ŝin ?

- Jes, ŝi estas mia amikino!

- Ĉu vi povas... ee... kiel diri...

- Jes, mi faros tion por amiko! li diras. Venu hejmen por manĝi, post tri tagoj.

- Ee... kiu estas ŝia nomo?

- Ŝi nomiĝas Anna.

- Kia bela nomo !

- Jes. Sed nun, mi devas iri hejmen. Ĝis revido !

Tri tagojn poste, mi iras al la hejmo de mia amiko.

- Saluton, Alberto! Saluton, Klara! (estas la virino, kiu loĝas kun li).

- Saluton, mia amiko! Ĉu ŝi estas tie?

- Ne, Anna venos poste. Ĉu vi volas trinki ion?

- Jes, dankon.

Anna ne venis ĝis nun. Ni trinkas, kaj retrinkas.

- Ee, diras Alberto.

- Jes?

- Mi ne scias kion diri...

- Ĉu ?

- Jes. Mi ne scias pri kio paroli.

- Sed oni povas paroli pri multaj aferoj...

- Jes! Sed ni havas nur cent vortojn...

- Ho! Anna venas, diras Klara. Saluton, Anna.

- Bonan tagon, Klara. 'tagon, Alberto. Saluton...?

- Li estas Ludoviko, diras Alberto, kaj ŝi estas Anna. Ĉu vi volas trinki ion?

- Dankon, ne. Kiel vi fartas?

- Bone, kaj vi?

- Mi fartas bone, dankon.

Mi iras al Anna. Mi sciis ke ŝi estis bela, sed nun, mi vidas ke ŝi estas TRE bela.

- Pardonon!

- Jes?

- Ĉu mi povas demandi al vi kion vi faras...ee... kio estas via laboro?

- Ĉu ni ne povas paroli pri io alia?

- Pardonon. Mi sciis ke mia demando estis malbona. Sed mi ne scias pri kio ni povas paroli. Ni havas nur cent vortojn. Laboro estas unu el la cent.

- Ĉu vi volas diri ke ne eblas paroli pri tio, kion ni volas?

- Jes. Tio estas la volo de la homo, kiu skribis tion...

- Kiu skribis kion?

- Tiu afero, en kiu ni estas nun... Sed oni ne devigas nin paroli...

- Kion alian vi volas fari...

- Ee... eble...he, la vorton por tio ni ne havas...

- Nun, ni manĝas! Klara parolis. Ni faras tion, kion ŝi diris.

- Mmm... tre bona manĝo! mi diras.

- Ĉu vi scias, diras Anna, ke ni vivas en novelo kun nur cent vortoj!

- Ne eblas tiel diri multajn aferojn, diras Alberto. Kiel vi scias tion?

- Tio estas skribita, mi diras. La unuaj vortoj.

- Kiel fari por ke li donu al ni aliajn vortojn?

- Mi ne scias. Eble, oni povas doni al li monon...

- Li ne volos nian monon. Ĉar nian monon li povas fari kiel li volas. Li devas nur skribi malmultajn vortojn por tio.

- Ĉu li donos al mi monon, se mi petos tion de li? demandis Klara.

- Eble ne.

Tri horojn poste. Ni iras al nia hejmo. Mi al mia hejmo, kaj Anna al sia hejmo.

- Ĝis revido!

- Ĝis... Ee...Anna!

- Jes?

- Ĝis!...

- Ĝis.

- Ne iru! Mi...ee...ĉu ni havas la vorton "ami"?

- Mi ne scias. Kial?

- Ĉar se ni havus ĝin, mi povus diri al vi ke...ee...ke...

- Ke kio?

- Ke... sed ni HAVAS ĝin!

- Ĉu ?

- Jes! ni havas ĝin! mi diris "ĉu ni havas la vorton "ami"?"!

- Kaj mi diris, ke mi ne scias. Ĉu ne?

- Ne estas tio. Mi parolis pri la vorto "ami". Se mi povas paroli pri ĝi, estas ke ni HAVAS ĝin!

- Kaj poste?

- Se ni havas ĝin, mi povas diri "ami" !

- Diru.

- "ami", "ami", "ami"...

- Kaj poste?

- Mi povas diri al vi ankaŭ ke mi...

- Ke vi kio ?

- Ke mi...ee... mi ne povas diri ĝin.

- Vi povas aŭ vi ne povas?

- Mi ne povas, sed pro alia afero...

- Ĝis...

- Ne! nun mi povas... Anna!

- Jes?

- Mi...AMAS vin!!!!

Amiko Renato G. transdonis al L! tiun ĉi kanzonon verkitan de nia kar-
memora kamarado **N. Bartelmes** en la jaroj 20aj :

AL LA SENNACIULARO

Salutas fratojn la Satano
Trans mar', trans ĉiu landa rond'
- Jen, nia kamarada mano
Jen ruĝa nia flagruband' !

Saluton al vi kunigemaj
En nova lingva komunec'
- Al ĉiuj vere ribelemaj,
Por sen kaj ekster naciec' !

Malnovajn, vantajn la kutimojn
Ni lasu al filistra kor'
Por ni la mond' ne havas limojn
Por ni popolo de l' labor'.

Agemon vekas celkonscio
Progresas mond' per nia far'
La venkon de la sennacio
Ja garantias Satanar'.

N. Barthelmess

Hagen Hite :

Ni tri kamaradoj

Jen la frenezuldomo :
nia provizora loĝejo.
Oni forkomandis nin, por ke ni forhaku arbojn.
Kvazaŭ kiel ekzercopor nia elasteco
baldaŭ komenciĝos diskotekvespero,
vespero en mortulhalo,
arbaro, tri kilometrojn for de la domo.
Ni ekmarŝas,
ni, la tri kamaradoj.
La vojo estas asfaltita.
Diable mallumas ;
kaj la arboj aspektas kiel nigraj vandoj.

Mi imagas, kiel ili portis la mortulojn sur tiu ĉi vojo,
sub malbenoj en la ŝanceliĝantaj lamplumoj.
La koro batas pli rapide,
ĉar mi tiel rapide marŝas,
kaj pro tio, ke tiklas min tiel agrable iuj fantombildoj.
En mia kapo okazas nekredablaj aferoj :
La ŝajnmortintoj de Poe martelas per duraj pugnoj
kontraŭ ĉerkkovrilojn,
sed la viro kun la falĉilo ne ellasas ilin.
Li sidas sur tombŝtono
kaj atendas la novalvenontojn,
kiuj survojas :
Nigra kolono,
konsistanta el tri petolaj kamaradoj.

Tiam ni alvenas.
La mortulhalo aspektas kiel arbara kabano.
Nur la fenestroj al la mondo mankas.
Ni pagas kaj eniras.
Interne ni iĝas subite sufiĉe gajaj kaj brue laŭtaj.
Jen diskoteko kun multe da lumo.
Jen eta danca areo.
Jen kvin longaj tabloj.
Jen improvizita koktelejo.
La vilaĝanoj observas nin misfide.
La dancoĉeĝo estas flegisto en la frenezulejo.
Li havas mafiosan vizaĝon
kaj gigantajn elstarajn orelojn.
Antaŭ du tagoj li klarigis al mi, kial la frenezjako necesas.
Lia amikino,
la koktelino,
same flegisto,
tre elegantas
kaj pli junas ol la dancestro je almenaŭ 20 jaroj.
La ercmontara "Muzikmaŝino" kirlas la ĉeestantojn
kaj rompas la korojn de la - nun jam unuiginta - dancpopolo
per kanto ercmontara :
"Kion faras la flosistoj?"
Kvindekjara nano vekas sensacian intereson
per tio, ke li ĉiam denove saltas aeren kaj poste
ĉiufoje ege stamfas la plankon per siaj groteske grandaj ŝuoj.
Skuate de ridoatakoj, ni baraktas pro aero
kaj viŝas la larmojn el niaj vizaĝoj.
Ĉar ni trinkas amason da biero,
ni fariĝas pli kuraĝaj kaj okulumas al la vilaĝaj belulinoj.

Mi devas pensi pri la freneza ino en nia provizora loĝdomo,
al kiu ni ĵetis kisojn,
al kiu ni mansalutis,
ni tri kamaradoj.

La freneza ino maltrankvilige belas,
kaj se ŝi alpaŝis sian fenestron,
tiam ni povis vidi
kiel ŝia tuta korpo tremis pro amsopiro.

Ni faras ŝercojn pri la iama senco de la ĉambro.
Ni imagas, ke ni ĉiuj sidas en kverkaj ĉerkoj,
pro eraro,
kun niaj arbohakiloj,
kaj ĉiu kun botelo da brando ĉe si.

Kaj ni imagas,
kiel ni denove elvenas,
en la nokto,
kiel ni ekscesos inferan mortulhalan diskotekon.

Amikoj ! Amikoj !
Kamaradoj ! Kamaradoj ! Kamaradoj !
Ni kurbas nin pro plezuro
kaj ŝutas la ruĝan ĉerizbrandon en niajn gorĝojn.

Giordano Falzoni :

Bonan nokton al vi, panjo,
bonan nokton al vi, suno,
bonan nokton al vi, Manjo,
bonan nokton al vi, luno,
al la lum' de la ĉielo
sur la flugo de l'abelo,
al la tago, al la helo,
al la Turo de Babelo.

Bonan nokton al vi :
dormu bone kun mi.

Bonan nokton, infanaro,
bonan nokton al sablero,
bonan nokton, onda maro,
bonan nokton al akvero,
al pulvoro de l'stelaro,
al pluvarko el pluvero,
al glorarko de la tero,
al la Stelo de l'vespero.

Bonan nokton al vi:
dormu bone kun mi.

Emma ANDIJEVSKA

Emma Andijevska estas ukrainlingva verkistino loĝanta en Munkeno. Dum jardekoj ŝi senlace "fosas sian sulkon", tradukas, verkas originale - poemojn, novelojn, dikajn romanojn. Ŝi ne estas facila aŭtoro. Ŝiaj poemoj ofte konsternas (mi aldonas tri poemojn, tradukitajn de Meva Maron), pri ĝenro de kelkaj prozaĵoj oni povas diskuti.

(...)

La verkistino ellaboris sian propran stilon, ŝiaj frazoj ofte estas longegaj (en romanoj ili okupas kelkfoje plenan paĝon!). Mi gardis ĉi tiun apartaĵon de l'aŭtora stilo.

la tradukintino :
OKSANA.

Jenajn novelojn elukrainigis **Oksana :**

Spacoj
Distancoj
Termometro
Botoj
Valizoj

Kiam dum liberaj momentoj mi komencis kolekti spacojn, ĉar mi ne plu povis rigardi kiel la homoj malŝparas la denaske ricevitajn spacojn, mi tute ne imagis kiajn dimensiojn havos mia kolekto. Ĉio komenciĝis per tio, ke iun tagon mi simple ne eltenis rigardante la brilan spacon, kiu aperadis antaŭ mi ĉiun fojon, kiam mia kolego, portante al mi por kontrolo statistikajn tabelojn, komencadis svingi la manojn, plendante pri l'mondo kaj homoj. Konvinkiĝinte ke neniu fremdulo apudas, mi proponis al li, kontraŭ mia monata salajro, aĉeti de li tiun spacon, kiu aperas ĉiufoje kiam li disetendas la brakojn. Mi eĉ mallevis l'okulojn sur paperojn surtablajn por ke mia rigardo ne perfidu kiom mi deziregas lian spacon, ja mi sciis ke tiu virga spaco, kie ankoraŭ spuris nenies piedo, kie l'aero kraketas pro freŝeco, valoras eĉ la jaran salajron, sed mia kolego decidis ke mi ŝercas. Li rigardis min, pripensante la sencon de tiu ŝerco, kaj, opiniante ke estas maloportune montri ke la ŝercon li ne komprenis aŭ ke ĝi estas stulteta, ekridetis kaj, svinginte la manojn la lastan fojon - ĉar ekde kiam la spaco iĝis mia posedaĵo, li ne plu povis svingadi la manojn, plendante ke pro akraj movoj io pikas lin enkoren - diris ke mi povas ricevi lian spacon senpage. Li ŝajne ĝis la morto ne komprenis, ke li donacis al mi spacon, kiun enivus multaj potenculoj, kvankam mi, estante profunde honesta homo, kelkfoje memorigis al li tion, vidante kiel li, dum interparolo, forgesinte ke li ne plu havas sian spacon, disetendas la brakojn kaj poste premas la manon al la koro pro doloro. Sed la homoj efektive kredas nur tion, kion al ili oportunas kredi, miaj klarigoj donis neniajn rezultojn, kaj tiel mi iĝis posedanto de mia unua spaco. Post tio mi kolektis multe da spacoj, eĉ ne evoluigante ian specialan metodon por kompletigadi la kolekton malpli koste. Homoj je mia miro tute ne taksis valora la spacon kiun ili portadis kun si, ĝi kuŝis dum jaroj neuzata, kaj mi konkludis ke la spaco homojn ne interesas. Ĉar mian plej grandan posedaĵon, duonmondon kun kelkaj galaksioj, mi ekhavis de vagabondo en stacidomo, kontraŭ duonbotelo da vino, kelkajn minutojn antaŭ entrajniĝo por veturi al mia kolego. Mi eĉ ne tro emas rememori tiun epizodon, ĉar kiam mi aludis al li pri la vera valoro de lia spaco, ne dezirante priŝteli lin, li ektimis ke mi simple avaras duonbotelon da vino kontraŭ ia, kiel li sin esprimis, "freŝa aero", kaj mi tuj

eksilentis por ne perdi la spacon, kiu preskaŭ forglitis el miaj manoj. Post iom da tempo mi iĝis tiom riĉa ke aliaj riĉaĵoj ĉesis interesi min, kaj finfine kion mi povus ankoraŭ deziri se sur la Tero ne ekzistas homo, kapabla elaĉeti de mi eĉ parton de mia posedaĵo. Mi devus esti kontenta, sed mi ne povas diri ke mi feliĉas, ĉar mia najbaro, maljuna rentulo, kiu loĝas super mi, havas etan spacon, ne pli grandan ol mia ĉapelo, sed tiu eta spaco limas kun Dio, kaj ĝuste tio senvalorigas tutan mian riĉecon.

DISTANCOJ

Mi rakontas tion ĉi ne tial ke mi estas ilia reganto kaj ke miaj subuloj agnoskas nur totalisman reĝimon, kvankam nenio malhelpas ilin foriri al najbaroj, ja la limoj de mia ŝtato ne estas indikitaj eĉ per vojŝtonoj, kaj la najbaraj ŝtatoj, havantaj alian soci-ordon, divenas limojn de mia ŝtato laŭ odoro, ĉar mi, kiel ĉiu totalisma reganto, scias ke mia potenco ne estas firma, kaj tial mi ordonas planti pompajn ĝardenojn tra la tuta lando, fosi kanalojn, kies nuraj nomoj jam elvokas teruron kaj miron, konstrui plej abomenajn konstruaĵojn, kiujn mi ordonas nomi Babilonaj turoj, kaj kiujn oni povas vidi el ĉiu angulo de mia ŝtato, kaj pro kiuj miaj subuloj ne povas dormi eĉ kun kurtenitaj fenestroj, ĉar la aspekto de l'konstruaĵoj, lumigataj laŭ mia ordono tage kaj nokte, forprenas de ili dormon - kaj ĉio ĉi cele inciti la homan imagon kaj subteni ĉe miaj subuloj iluzion, ke ili vivas en la plej bona ŝtato de l'mondo. Mi ordonas al ili planti ĝardenojn. Mi diras al ili, ke la ĝardenoj, kiujn mi ordonas planti, estas la plej belaj, kaj tio tiel influas homojn, ke eĉ loĝantoj de najbara ŝtato, kie ĉio abundas kaj kie ne estas totalisma reĝimo, estas tentataj per tiuj ĝardenoj, kiuj efektive neniam elkreskas kaj kiuj multe pli mizeras ol la plej malzorgataj en ilia patrujo, kaj venas en mian regnon, kiu konsistas el sablo, ŝtonoj, miaj subuloj kaj mia volo. Jes, mia volo vere grandas, tute eblas ke ĝi transtiras al mi homojn el aliaj ŝtatoj, ĉar sufiĉas nur rigardi ajnan vojkruciĝon en mia regno, aŭdi gratulojn, senti kiel spiras miaj subuloj, por konvinkiĝi kiom ĉiopova ĝi estas. Ja nur al ĝi mi ŝuldas ke neniu krom mi scias ke mia ŝtato laŭlonge kaj laŭlarĝe havas nur kelkajn metrojn, kvankam la distancoj kiuj ekzistas en kapoj

de aliŝtatanoj pro-superabundo de imagitaj distancoj en kapoj de miaj subuloj, ĉi tiuj distancoj, kiujn mi al ili sugestas, iĝas senlimaj, kaj pri mia ŝtato vagas legendoj ke ankoraŭ ne troviĝis homo, kiu ĉirkaŭirus aŭ ĉirkaŭveturus ĝin almenaŭ unudirekte. Pri realaj distancoj en mia regno scias nur mi, sed se mi ekdezirus sciigi tion ne nur al miaj subuloj, kiuj kapablas nur plenumi mian volon, sed ankaŭ al loĝantoj de najbaraj ŝtatoj, ili ne kredus, tiom ili certas pri senlimeco de miaj posedaĵoj. Certe, per tio ĉi mi ne volas diri ke ege jukas min iun ajn persvadi pri la reala aspekto de mia ŝtato, sed ne ĝojigas min tia humilo, tia sindonemo al mia volo. La vera problemo kuŝas en tio ke mi amas realajn distancojn kaj kelkfoje mi bezonas teruran memregon por ne cedi al tento halti kaj rigardi tiujn grandajn distancojn, kiujn nur mi povas vidi, ĉar post tiu ekvido ne plu eblos reveno, kaj se mi almenaŭ unu fojon rigardos, post tio ne eblos trovi eĉ la lokon de mia iama regno.

Kiel klarigi neĝon en lando de l'eterna suno,
kiel klarigi l'eterne verdan arbon
al iu en glacio kaj frostoj ?
Vivo blovas en paperan fluton.
Defluas akvo de l'tegmento.
Sed ĝi estas jam el tempo
ne plu alirebla.
Ĝis malferminte l'okulojn,
vi trovas vin por ĉiam forironta.

* * *

Pri orangoj kiel pri la propra perfektigo.
Korto. Gutas el tegmentkanalo.
Pri verdaj proporci-flugiloj
kaŝitaj en porcelano.
Delikata skribornamo
forfrotas fluajn trajtojn
de kruĉo da tombtero kaj gruzo.
Branĉombro dispendigas kanaletojn.
Akvero. Segi sarkofagmemoron.
El ladgamelo
lekas hundo, kiu gardas la mortintojn.

(El "Kantoj sen teksto", 1968)

TERMOMETRO

Iun tagon D. rimarkis ke lia termometro montras ne ĉambran temperaturon, sed aŭguras diversajn okazontaĵojn. Komence D. pensis ke li eraris. Sed antaŭ du semajnoj, matene, la termometro montris ke tagmeze de la sama tago oni prirabos l'urban bankon, kaj tiel okazis. Antaŭ semajno ĝi montris revenon de l'najbarina edzo, kiu forestis oni-ne-scias-kie dum ok jaroj. Kaj antaŭhieraŭ D. ne povis ekdormi pro ĝoja bruo elvokita per reapero de l'edzo.

La termometro montris ne nur grandajn, sed ankaŭ malgrandajn eventojn. Ĝi povis tute precize montri kiam oni perdos ŝuplandumojn, je kioma horo malfermiĝos vendejoj, krome ĝi scipovis solvi kaj komenti songojn.

D. ne volis kredi, sed ĉiufoje devis konvinkiĝi ke la termometro efektive tre precize aŭguras ĉion. Tiu malkovro eĉ iom deprimis lin, sed baldaŭ tio pasis ; D. komencis alkutimiĝi al la termometro kaj poste ankaŭ uzi ĝiajn novajn ecojn.

Iĝinte tute kuraĝa, li aŭguris al iu najbarino lokon kie ŝi trovos la perditan hundidon. Al oficisto, kiu loĝis en l'unua etaĝo kaj en kiun pro sida laboro enloĝiĝis diabloj, li konsilis trinki varman oleon. Matene l'oficisto, alkurinta danki, informis ke lin vizitis kvin diabloj, sed li petis ne diskonigi tion.

La termometro neniam eraris, kaj D. komencis preni monon por aŭguroj. La malnova loĝejo iĝis por li malvasta kaj li rimarkis ke li havas eluzitajn vestojn. D. aĉetis novajn vestojn, sed restis en la malnova loĝejo, antaŭ kies pordo nun tage kaj nokte staris vico, kiu komenciĝis ĉe l'doma enirpordo kaj finiĝis ĉe lia pordo en la kvara etaĝo.

Same neatendite iun tagon la termometro komencis miksi aŭgurojn. Tio estas, ĝi daŭre precize montris kio devas okazi, sed miksis personojn. La vico malpligrandiĝis, kvankam oni ankoraŭ ne povis trairi la ŝtuparon ; la klientoj, kiuj eĉ ekloĝis sur la ŝtuparo, interbatiĝis pro misaŭguroj. Flugis enaere suĉinfanoj, meteore soris plafonen formorditaj oreloj,

Denove mendebla ĉe SAT-Broŝurservo:

Kiel diri... ?

Esperanta Frazologio, 5000 esprimoj
kompilitaj de L. Lentaigne
(kompletigita reeldono de 1988)

25 FF + afranko (20%-rabato ekde 4-ekzemplera mendo)

hartufoj, kaj de malproksimo ŝajnis ke tie turniĝas potencaj ventumiloj.

Baldaŭ la vico malaperis, antaŭ la pordo de D. restis nur du obstinaj barbuloj. Sed kiam iliaj barboj kunkreskis, ankaŭ ili iris for.

Kelkajn tagojn post tio la termometro ekdiboĉis kaj, montrinte ion, kion nur ĝi komprenis, post longa hezitado haltis je aŭguroj, tute kontraŭaj al la antaŭaj.

D. penis ne atenti ĝin, estante senpova neniigi la termometron ; li ĝin rompadis, ĵetadis tra fenestro, donacis al najbaroj - la termometro permesis, ke oni faru kun si ion ajn, sed poste, kvazaŭ nenio okazis, denove pendis surmure kaj ne movis sin. D. vidis kiel en tiu lukto konsumiĝas liaj fortoj. Decidinte, dum ankoraŭ ne estis malfrue, meti finon al ĉio, D. pakis siajn aĵojn en valizon, vestis koltukon, rigardis la termometron la lastan fojon, kraĉis kaj iris for.

Monon li ne havis. Dum tiu tempo, kiam li perlaboris per la termometra aŭgurado, D. tute malkutimiĝis labori kaj ne plu sciis kion fari.

Li iris en parkon, ligis la valizon per la koltuko, pendigis ĝin sur seka arbobrango por ke neniu ŝtelu, kaj sencele direktis sin en la urbon, esperante ke la sorto rememoros pri li.

D. estis tre mirigita, konstatinte tuj ke oni lin konas ; oni sin retoturnis, montris lin perfingre, flustris inter si. Poste iu bubo ĵetis ŝtonon al li, kaj ĉirkaŭ D. ekestis homamaso. Kvazaŭ ĉiuj nur tion atendis, homoj komencis terure krii, postulante, ke li redonu monon pro l'aŭguroj. Iuj ne povis elteni la faktan mem de l'termometrekzisto kaj en la plej altaj tonoj kriis pri justeco, perdita profito, malestimo kaj profanado de superrealo kaj ankoraŭ ion alian, kion pro l'bruo ne eblis kompreni. Iu fortikulo kriis, ke tiajn kiel D. li bone konas kaj ke li scias kion necesas fari kun tiauloj, kaj puŝis sin antaŭen tra l'amaso.

D. entiris la kapon pli profunden en la ŝultrojn kaj ekkuris. Oni ŝutis sur lin bastonojn, ŝtonojn, pomojn, ululis el dompordoj. Post D. kuris dikaj bazarulinoj kaj batis lin per longegaj verdaj kukumoj. Poste iu pikis lin pertranĉile en dorsoflankon. La pantalono malsekiĝis pro sango kaj la kruroj de D. iĝis tiom magraj ke l'amaso nevole haltis kaj ĉesis interesiĝi pri li. La bazarulinoj per antaŭtukoj viŝis siajn kukumojn.

Preskaŭ senkonscia D. per lasta fortostreĉo atingis sian loĝejon. Dum lia foresto oni malfermis la fenestrojn kaj la

ĉambro plenis de suno kaj tili-odoro. D. volis aliri la liton, sed ĝi navigis iom flanken kaj li falis vizaĝalplanke. Per la pupilangulo de l'maldekstra okulo, kiun jam ekkovris vualo, D. ankoraŭ vidis ke la termometro montras la ĉambrobran temperaturon.

BOTOJ

Por la naskiĝtago de D. oni donacis al li botojn. Ili estis belaj, brilantaj, sed D. povis fari en ili nek unu paŝon. La botoj estis nek grandaj nek malgrandaj, male D. ĉiam portis ĝuste tian numeron. Sed nun, ĉiun fojon kiam li provis vesti la botojn, kaptis lin konvulsioj, D. falis kaj poste kuŝis malsana. Tial li firme decidis liberiĝi de ili, kio evidentiĝis ne tute facila afero.

D. iris al granda ŝuvendejo, sed tie oni rifuzis, dirante ke la botoj apartenas al iu nekonata firmao, ili ne estis aĉetitaj en la vendejo kaj tial oni ne akceptas. Ferminte la pordon de l'vendejo, D. sendis la vendistojn al diablo kaj, kolere fajfante, iris al la dua, poste tria ŝuvendejo kaj jam kun kreskinta timo al ŝufaristoj, konatoj - ĉie same sensukcese. Kvankam la botoj al ĉiuj plaĉis kaj taŭgis por piedoj grandaj kaj malgrandaj, sanaj kaj kriplaj, eĉ la plej grandaj kuraĝuloj ne povis porti ilin.

La fakto posedi botojn, kiujn eblas nek porti nek vendi, tiom agacis D., ke li ĵuris vendi ilin ajnpreze, eĉ se tio kostos al li la vivon. Li sentis ke li devas tion fari por ne perdi memestimon.

Baldaŭ en la urbo ne plu estis homo, al kiu D. ne turnis sin. Dum libertagoj li prenis la botojn kaj veturis eksterurben.

D. mem ne rimarkis kiel la vendprocedo iĝis senco de lia vivo. Se subite li sukcesus vendi la botojn, li iĝus profunde malfeliĉa.

La cirklo de liaj vojaĝoj pligrandiĝis tiel, ke D. devis lasi sian laboron. Li lasis ĝin kun facila koro - la laboro jam delonge ne havis por li ajnan signifon ; li vendis restojn de siaj posedaĵoj, aĉetis dorsosakon, metis en ĝin la botojn kaj ekvagis tra la mondo, lasante post si landojn, sezonojn kaj hejmfajrujojn. Iun printempon, kiu neniel diferencis de antaŭaj, D. konstatis ke li trairis ĉiujn landojn kaj ke venis tempo ekloĝi en stacidomoj.

En stacidomoj al li plaĉis. Aĉetantoj ne mankis kaj ne necesis foren iri. Dum pasintaj jaroj D. ellaboris specifan

vendomanieron. Liaj movoj estis tiom konvinkaj, tiom perfektaj, ke preterirantoj nevole haltis antaŭ li kvazaŭ kunikloj antaŭ boao. La staturon de D., magran kaj altan, eblis vidi el ĉiuj stacidomanguloj. Ŝajnis ke li ne konas lacon, nur lia barbo komencis griziĝi.

Oni konis D. en ĉiuj stacidomoj. Oni konis ankaŭ la historion de liaj botoj. Sed dum la tempopaso l'enhavo de l'historio forgesiĝis, oni modlis ĝin diversmaniere, pri ĝi vagis la plej diversaj onidiroj. Iuj eĉ asertis ke D. estas profeto kaj komencis kalkuli la novan eraon ekde lia alveno en stacidomon.

D. tranoktis en vagonoj aŭ budoj, en kiuj oni vendis diversajn bagatelojn. Kiam al li subite, pro neklaraj kialoj, ĉesis tie plaĉi, li rampis en sian dorsosakon, jam truitan, kaj dormis en ĝi. Li manĝis tre malmulte - tion, kion donis nekonatoj - la konatoj opiniis ke li entute ne manĝas, kaj tio sufiĉis.

Lia ĉeesto elvokis establiĝon de nova kutimo. Estis konsiderata kiel bontona almenaŭ unufoja provo aĉeti la ĉiam neireblajn botojn. En la urbo vivis homo, kiu 99 fojojn provis aĉeti ilin, pro tio oni komencis akcepti lin en ĉiuj aristokrataj salonoj kaj l'urbestro dekoris lin per ordeno.

La gloro de D. kreskis, kaj iun tagon laŭtparolilo, anoncanta alvenon kaj foriron de trajnoj, komencis reklami la botojn. Tiu reklamo aŭdeblis inter bruo kaj fajfado de trajnoj, tage, nokte, kiam la stacidomo malpleniĝis kaj eĥo elrampadis el pakaĵdeponejoj. Inicijatinto de l'reklamo estis unu el la disĉiploj de D., kiel nomis sin certa grupo de stranguloj, kiuj are vagis antaŭ la stacidomo kaj kelkfoje eĉ provis eniri ĝin. Sed sufiĉis unusola rigardo de D. por ke ili senspure malaperu.

D. ne povis elteni ilin, agacis lin ke iu enmiksiĝas en liajn privatajn aferojn. Kelkfoje la reklamo de l'botoj ŝajnis al li profanado de tio, al kio li dediĉis sian vivon. Se diri veron, tio okazis ne tre ofte, ĉar li atentis nur la botojn, kaj ĉio ekster ilin lin ne multe tuŝis.

La tempo pasis. En la urbo kreskis la nombro de l'disĉiploj. Ili tenis sin flanke, sed de fore ili senĉese observis ĉiun lian movon, ĉiun vizaĝesprimon, penante alproprigi ilin, por ke siavice aliuloj lernu de ili. La disĉiploj promenis kun longaj tabuloj, sur kiujn ili enskribis ĉion, kion, laŭ ilia opinio, povis diri D. Ili ĉerpis el ĉeffonto.

D. pli kaj pli maljuniĝis. Lia alta, maldika staturado ankoraŭ

maltrankviligis homojn. Sed iun tagon, alvokante aĉetantojn, D. meze de vorto sentis indiferenton al la botvendo. Tio okazis tiel subite kvazaŭ lin traveturus tramo. D. aŭskultis sian memon, penante kompreni kio al li okazis, sed nenion komprenis. Li ne ĉesis vendadi, sed liaj movoj, antaŭe tiom perfektaj, perdis konvinkopovon, kaj pasantoj iris preter ne rimarkante lin. Laŭ kutimo D. ankoraŭ vokis aĉetantojn, sed anstataŭ krio elgorĝigis feblajn susurarbustetojn, kaj D. komprenis ke la botvendado, kiu estis lia vivo, finiĝis definitive. Li iradis tra la stacidomo, kvazaŭ l'unuan fojon vidante ĝin - ĉiuj liaj sentoj ĉirkaŭflugis la botojn - poste li tiris la botojn el la dorsosako, karesis ilin kaj sidiĝis antaŭ ili. La botoj estis brilantaj kaj belaj, kiel dum tiu tago kiam oni donacis ilin al li. Ekde tiu tempo, kiam D. ekvagis tra l'mondo, li ne provis vesti ilin.

D. ridetis al la botoj kaj ŝovis siajn piedojn en ilin. La botoj taŭgis ! En ili estis tiel leĝere kaj komforte, kvazaŭ ili delonge prepariĝis kaj atendis sian mastron. D. eĉ palpis ilin kelkfoje, por konvinkiĝi ĉu la piedoj efektive estas en ili.

Pro kontento D. saltis kaj subite sentis ke lia korpo perdas la pezon. Li palpis sin permane, rigardis la botojn kaj komprenis ke venis lia tempo morti. D. saltis la lastan fojon, farinte salton en la aero - lia korpo estis tiom leĝera, ke li tute ne sentis ĝin - metis la dorsosakon kaj eliris el la stacidomo, en kiu li loĝis multajn jarojn.

Oni lavis l'urbajn stratojn. Akvaj ŝprucoj batis per ventroj la trotuarojn. La leviĝanta suno okupis la tutan horizonton. Helpantoj de bakistoj veturigis sur bicikloj korbojn kun dormemaj bulkoj. D. transiris straton, preteriris domojn kaj nehaste foriris al la suno. Ekde malproksimo observis lin la disĉiploj, ne riskante sekvi. Lia nigra staturado iom post iom malgrandiĝis kaj, iĝinte punkto, eniris la sunon.

Tiam la suno puŝis sin for de l'tero kaj ekiris tra l'ĉielo.

VALIZOJ

- **Momenton, momenton, sinjoro !** - rekte al D. kuris fortika homo, - Sinjoro, mi donacas al vi ĉi tiujn valizojn !

Antaŭ ol D. sukcesis kompreni kio okazis, la dikulo jam malaperis en proksima strato. Ĉe la piedojn de D. senkulpe ridetantaj portistoj metis dekon da grandaj valizoj.

D. rigardis la valizojn, la portistojn, levis persultre l'aeron kaj intencis pluiiri. Eble dum aliaj cirkonstancoj li reagus aliel al simila donaco, sed ĉi-foje D. hastis al rendevuo. Li

decidis ke venis tempo konfesi sian amon al fraŭlino kaj ke hodiaŭ li tion faros, do la valizoj estis por li tute nebezonaĵoj.

La portistoj kaptis la valizegojn kaj komencis postkuri D. Li haltis.

- Mi ne bezonas valizojn !

La portistoj rigardis unu la alian, svingis la kapojn, kaj ĉe l'unua paŝo de sia nova mastro sekvis lin. D. havis nek tempon, nek emon disputi kun ili, supozante ke ili forlasos lin, se li ne atentos, kaj, ne retrorigardante, li pluiris.

Estas dimanĉo, pensis D. vidante ke duono de l'urbo eliris al parko. Sur ĉiu arbo pendis po suno, kriis sovaĝaj anseroj kaj tuta birdetaro. Oni promenigis hundojn. Feliĉaj gepatroj, akompanataj de konatoj, parencoj kaj melhundoj, puŝis infanĉaretojn ; ĉe la lago sidis homoj sen mono por lui boaton kaj iom navigi sur la lago, kaj laŭte admiris la naturon. Eĉ D. ekdeziris diri : "Arbo, kia miraklo de l'naturo!" aŭ "La mondo estas beleĝa!"

Sur benko, inter du barbaj avinoj sidis la fraŭlino. Ekvidinte D. kun la valizoj, ŝi saltis kaj floretoj sur ŝia robo velkis.

- Vi forveturas? Jen kia vi estas! - kaj ŝi kuris for plorante.

- Atendu, mi ĉion al vi klarigos! - kriis D. postkurante ŝin.

La portistoj, saltante kaj tretfarante al si vojon, urĝe sekvis lin. Iun homon ili trafis pervalize tiel, ke lia kapo turniĝis per nuko antaŭen. La terurita viro, vidante la propran dorson, muĝis timante movi sin. Preterkurante la portistoj tuŝis infanĉareton. Pro l'puŝo bebo elflugis el la ĉareto kaj, kroĉinte sin per ĉemizeto al branĉo, ekpendis super homamaso.

En ĝenerala ĥaoso D. perdis la fraŭlinon, sed halti post tio, kion faris la portistoj, estis tro malfrue, kaj D. kuris antaŭen, ne ĉirkaŭrigardante, nur por esti for de l'krioj, homoj, valizoj, kiuj tiel stulte ruinigis lian vivon.

En la unua strattorniĝo, kie ne plu aŭdeblis krioj, D. haltis kaj elspiris. Apud li, facile kaj gaje kvazaŭ la kurado estus bagatela amuziĝo, haltis la portistoj kaj metis la valizojn.

- Malfermu la valizojn, mi volas almenaŭ scii kio estas en ili!

- Sinjoro, - diris iu portisto - ĉi tiujn valizojn ne eblas malfermi.

- Do frakasu ilin !

- Ilin ne eblas neniigi.

- Tiukaze iru al diablo !

- Sinjoro, ni estas la viaj.

Se D. havus malsanan koron, ĝi krevus pro l'kolero, sed la koro de D. funkciis kelkĉevalforte ; post minuto ĝi dissendis la sangon laŭ siaj lokoj kaj D. eksentis nur malsaton.

- Diablo vin prenu, - li diris, palpante en la poŝo kelkajn monerojn, tutan sian havaĵon. - Iu el vi iru ĉeti kelkajn bulkojn por mi.

- Sinjoro, ni ne scipovas ĉeti.

- Se vi estas la miaj, do vi devas, mi malsatas, rapidu !

- Sinjoro, vi povas murdi nin, sed ni ne scipovas ĉeti, ni scipovas nur porti la valizojn.

Post tio D. plu nenion diris.

La strato tiom mallarĝis, ke estis strange ke ĝi ankoraŭ ekzistas en tia granda urbo. Domoj staris mortaj, kvankam super de unu domo al alia pendis malsekaj tolaĵoj. Krom gutoj, fojfoje falantaj sur la pavimon, nenio indikis la homan ĉeeston. D. sidiĝis sur iun ŝtonan peroneton kaj ekdormis, apoginte sin al ies pordo, kiu laŭaspekte ankoraŭ neniam malfermiĝis.

Io skuis D., ĵetis flanken, krevigis la timpanojn, kaj li vekigis. Ĉirkaŭe, kiom kaptis l'okuloj, el malnovaj kaj plej novaj, grandaj kaj etaj aŭtoj kriaĉis ŝoforoj ; kelkaj eĉ deprenis la stirradojn kaj interbatiĝis per ili. D. sidis en aŭto, kiun stiris nebulstatura ŝoforo. Malantaŭ li entuziasme ridetis la portistoj.

- Kio ĉi tie okazas ?

- Ĉi tiuj ŝoforoj estas malfeliĉaj, ili ne sukcesis meti vin en siajn aŭtojn.

- Mi ne havas monon! - ekkriis D. - Vi eraras, pensante ke miaj valizoj ion valoras !

- Al vi ne plaĉas la rapideco - ĝemis la ŝoforo kaj donis plenajn gasojn.

L'aŭto ekmuĝis kaj, preterpasante korpojn de aliaj aŭtoj, sur unu rado turniĝis flanken.

- Haltu! mi volas eliri, haltu! - kriis D., ĉirkaŭbrakante la seĝon por ne elfali. Preter li kuris la urbintestoj.

Antaŭ unu el la plej belaj hoteloj l'aŭto haltis, kaj la posedanto de l'hotelo elkuris por propramane malfermi pordeton por D.

D. fulmrapide decidis : nun aŭ neniam, li batis la posedanton perkape en la ventron, elsaltis el la aŭto kaj ekkuris. Sed fuĝi li ne sukcesis : oni kaptis lin kaj surbrake portis al la hotelo.

- Idiotoj, mi ne havas monon, mi ne volas hotelon - laŭ la takto de l'portantoj raŭkis D.

Tion oni interpretis kiel deziron esti sola, kaj la posedanto de l'hotelo, subtenante la vunditan ventron, ordonis forĵeti ĉiujn loĝantojn kaj disponigi la tutan hotelon al D.

La loĝantoj en piŝamoj, ĥalatoj aŭ tute sen, svingante dentobrosojn kaj minacante l'hotelmaston, tiom longe staris antaŭ l'hotelo ke ili enkreskis la teron. Kiam iliaj kapoj atingis flornivelon, oni erpis la teron kaj plantis florojn.

La vivo de D. iĝis neeltenebla. Kie ajn li aperis, ĉie oni estis feliĉaj akcepti lin, kvankam li neniam pagis ; al ĉiuj, ŝajnas, sufiĉis nura aspekto de l'valizoj. Se D. ordonus ŝuti ormonton antaŭ si, ĉiuj rapidus plenumi lian deziron. Tio lin tute ne ĝojigis, la portistoj sekvis lin eĉ en necesejon, kaj D. nur en rememoroj vidis tiun tempon, kiam post li neniu kuris.

Li tre ŝatis naĝi, eĉ iam partoprenis konkurojn, kaj oni multe esperis pri li, sed nun la portistoj faris malplaĉa eĉ tiun distron. Kiam D. aperis ĉe iu akvujo, stadiono, rivero, lago, aŭ, esperante ke tie estos malpli da homoj, veturis al maro, la portistoj akompanis lin, kiam li plonĝis - la portistoj subakviĝis kaj postnaĝis lin kun la valizoj, ne forlasante lin eĉ minuton. Tio elvokis sensacion. Post D. iradis amasoj da raportistoj, ili fotis lin, kaj gazetoj brilis per titoloj : "Mistero de l'naturto aŭ sinjoro kun valizoj".

D. sentis sin ege soleca. En la urbo li havis kelkajn konatojn, kiujn li volonte vizitus, li volis iri al teatro, kinejo, sed kun la valizoj li ne kuraĝis.

Iufoje post pluvo li rememoris sian lernejan amikon kiun li delonge ne vidis (kiom D. memoris, li estis unusola homo, povanta konsili ion saĝan), kaj, forŝovante ozonnubojn, superŝutita per la suno kiel bombono, li iris al li serĉi la konsilon.

La kompano tre ekĝojis pri l'vizito, sed, ekvidinte post la dorso de D. portistojn kun valizoj, tuj moliĝis, perdiĝis kaj komencis **vii** al D.

- Ĉu **ci** freneziĝis, almenaŭ **ci** komprenu! - petegis D., rakontante l'aventuron kun la valizoj. Sed la kompano malatentis, dirante nur "jes" aŭ "ne", kaj, kiel ŝajnis al D., suferis pro lia ĉeesto.

D. estis tute sola en la mondo. Pli kaj pli ofte okazis ke li dum semajnoj ne eliris eksteren ; li ŝlosis sin en la hejmo kaj sidis antaŭ siaj valizoj. Li malamis la portistojn, kiuj, apogante sin al la valizoj, dormis stare, dum li ne moviĝis. La valizoj mem eĉ pligrandiĝis - D. ne mirus, se iun tagon ili malfermiĝus kaj englutus lin. Venis tago kiam li decidis

fini la vivon. D. amis la vivon kun ĝiaj bonaj kaj malbonaj flankoj, sed ĉu tiu stato, en kiu li troviĝis, estis vivo ? La fortoj de D. elĉerpiĝis.

Nodante post longa paŭzo la kravaton, li decidis ĵeti sin sub trajnon, sed kiam la kravato estis jam nodita, li pensis ke pli bonus sub aŭton.

Estis fine de printempo. Oni elportis lavkuvojn kun akvo varmiĝi sub la suno. Oni lavis kaj tondis hundojn. Dolĉ-lacaj trotuaroj plektiĝis sub piedoj kaj malhelpis paŝi. Maljunaj fraŭlinoj promenigis katojn sur herbejoj ; al tube levitaj kataj vosto estis ligitaj ŝnuroj, sur kiuj sekiĝis tolaĵoj. La aero ĉe stratanguloj simile al gasakvo malfaciligis la spiradon, inter domoj ĝi pendis molbulke, odorante per vanilo, frititaj eltombejaj semoj kaj akoro.

D. enspiris la straton kaj, timante reрпиensi, kuris al stratkruciĝo, kie, kiel li decidis, devis finiĝi lia surtera ekzisto. D. nenion pensis, nenion deziris, li nur plirapidigis sian kuron, kaj turniĝinte en alian straton li plej impete batis almozulon, kaj ambaŭ falis sur la trotuaron.

- L'almozulo levis sin, skuante sin kvazaŭ el akvo, vizaĝtordita pro kolero, sed, vidinte la valizojn, li iom trankviligis kaj kolere pikis per la ĉapelo la bruston de D.

D. rigardis l'almozulon kiel fantomon kaj ne moviĝis.

- Monon! - pli kolere alŝovis sin l'almozulo kaj tiris D. je maniko.

- Mi donacas al vi la valizojn! - ekkriis D. rekten en pupilojn de l'almozulo kaj, antaŭ ol tiu sukcesis gluti la miron, malaperis en la plej proksima strato.

El novellibroto "Vojaĝo" elukrainigis **Oksana**

NATURMORTO VOJAĜANTA EN TEMPO

Salo. Botel' : movebla laborint'.
Tranĉita turbo. Plastro post remunto.
Jen pecoj sur la dikaj foliantoj,
vin-prezoj kun mustardmakula rand'.

Helike plenŝtopita glas' : korund'
splitigis flagrojn kiel elementojn
kaj parametrojn - al apogaj pintoj.
Ĝis al si mem apuda konkurenc'.

Ĉar lum' angulas, kiel filokseroj.
Kaj ezofag' atendas eliksiron
el dimensi' alia - glut' fatala,

viola spegubildo malkomforta,
realkonturo trikvarone for
por mond' - el nul' - dum paŭz' de far' al far'.

Emma Andijevska
Elukrainigis Meva Maron.

Pri etnaj lingvoj kaj MISTRAL

En unuigitaj regnoj, etnaj lingvoj aŭ dialektoj, pli-malpli daŭre vivaj, regresis fronte al la oficiala "nacia" lingvo. Por ekzemplo, en Francio, la alzaca, la bretona, la flandra, la korsika, la vaska, la kataluna ; kaj la okcitana, la lingvo de "oc", la glora lingvo de la mezepokaj trobadoroj, kiu kovris vastan teritorion de Aŭvernio, Limoĝio, Perigordo ĝis Pireneoj kaj Mediteraneo, de Akvitanio kaj Bearnio ĝis la itala landlimo. La provenca estas unu el ĝiaj dialektaj branĉoj.

En la lastaj jardekoj naskiĝis aŭ vigliĝis movadoj por revivigo kaj elvolvigado de tiuj etnaj idiomoj. En la esperantistaro tiuj movadoj estas diverse taksataj. Unuj rigardas ilin kiel reakcian nostalgion al pasinteco, strebanta kontraŭflue al la historia procezo. Laŭ aliaj ĉio, kio kontraŭas la hegemonion de la grandaj naciaj kulturlingvoj, kaj helpas ĝin malplifortigi, estas bonvena kiel utila al nia mondlingvisma celo.

Ne diskutante pri tiuj interkontraŭaj opinioj, mi staras ĉi tie sur alia vidpunkto : nome tiu de nia kultura rolo. Unu el ĝiaj aspektoj konsistas el esperantigado de majstroverkoj el ĉiuj idiomoj, ĉu naciaj ĉu etnaj, por ilin diskonigi al ĉiuj gentoj en la mondo : por tiu celo ja sufiĉas unu taŭga traduko en la lingvo internacia.

La provenca poeto **Frederi MISTRAL** (1830-1914)* estas unu el tiuj majstroj, kies verkaro apartenas al la komuna trezoro de la tutmonda literaturo. Li verkis en la belsona rodana

* En la tempo de Mistral la provenca idiomo estis konata de sufiĉe multaj lingvistoj kaj beletristoj en Italio, Britio, Irlando, Germanio, Skandinavio kaj Usono, kaj Mistral ricevis en Stokholmo nobelpremion pri literaturo (1904).

dialekto, parolata en Arlezo, en Avinjono, en Aikso-la-Provenca, en vilaĝoj kaj sur la kamparo de tiu sunbanata regiono.



En 1859, 29-jara, Mistral fulme famiĝis per apero de sia **Miréio**, poemo en 12 kantoj, tuj salutita de la granda Lamartine kiel aŭtenta majstroverko. Sekvis pluraj verkoj egale belaj : **Calendal**, **Nerto**, poemkolektoj : *Les Isle d'Or* (la Oraj Insuloj), ĝis *les Oŭlivado* (la Olivrikolto, la lasta vintra rikolto en Provenco, el kiu la bela soneto *Durandalo*, kiu aperis en traduko de Waringhien en *Sennacieca Revuo*

n-ro 105, j. 1977), kaj **la Poemo de Rodano**, aperinta unuafoje en 1896, pri kiu li diris : "Mi faris mian kredkonfeson en la Poemo de Rodano".

Krom tiuj versaĵoj li verkis proze "Memori e Rahonte" (Memoraĵoj kaj Rakontoj), kaj la grandiozan vortaron nomitan "Trezoro de l'Felibriĝo" ("Felibrige" estas la movado iniciatita de la Felibroj, kiel sin mem nomis la novaj trobadoroj de la XIX-a jarcento).

La verkoj de Mistral aperis kun franca traduko farita de li mem, fronte al la provenca originalo. **Mirĉio** estis tradukita en multajn lingvojn, kaj ĝiaj tri unuaj kantoj en esperanton (P. Champion kaj D-ro Noël, 1909). Bedaŭrinde nur tiu komenca parto aperis. Nia amiko Marcel Jullien el Aikso la Provenca entreprenis plenan tradukon, sed la morto lin trafis antaŭ la fino de tiu entrepreno.

Pli modeste mi elektis la Poemon de Rodano, esceptan en la poeziaj verkoj de Mistral, ĉar ĝi konsistas el senrimaj versoj, kio plifaciligas la esperantigon. En ĝi Mistral zorge evitis rimojn kaj eĉ asonancojn. Tiuj versoj estas ĉiuj de egala longo : dek unu silaboj, el kiuj la lasta ne akcentita, laŭ la modelo de la famaj versoj de Dante Alighieri :

"Nel mezzo del camino della vita..."

En tiu skemo Mistral virtuoze enkondukis variajn metrojn, eĉ kelkajn karambolojn, kiuj rompas la monotonecon de tro rigide regula ritmo. Mi provis sekvi lian ekzemplon en mia traduko. La eventualaj legontoj bonvolu noti, ke mi neniam uzis tiun poezian licencon, laŭ kiu iuj poetoj ofte donas al la vokalo **i** la mallongan valoron de la konsonantoj, formante diftongon unusilaban kun la sekvanta vokalo. En mia teksto, ĉiam ĉielo, fiera, diablo ks., estas trisilabaj, violono, piedvesto kvarsilabaj, ktp.

La provencaj vortoj transskribitaj kaj la tre malmultaj neologismoj, kiuj ne troviĝis en PIV, estas klarigitaj per piednotoj. La numeroj en la maldekstra margeno sendas al finaj notoj, grandparte ĉerpitaj el la notoj de S-ro Pierre Rollet en la eldono Ramoun Bérenguié de 1971. Ili rilatas al historiaj detaloj, legendoj, fabeloj, kc.

VALO

Noto de SAT-Broŝurservo :

"**La Poemo de Rodano**" ĵus aperis, 136-paĝa, en la modesta broŝura serio. Ĝi ja indus pli belan veston... Broŝurabontoj ricevos ĝin automate. Aliaj interesatoj povas jam nun mendi ĝin : mendkodo PR, prezo : 30 FF (inkluzive de la afranko, se la mendo okazos antaŭ la fino de 1988)

Nia felietono :

FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO

de **Petro USPENSKO** (OUSPENSKY)

(resumpecoj)

LA TRI FORTOJ DE KREADO EN LA GRANDAJ RELIGIOJ HINDA KAJ KRISTANA

La 3 fortoj en la hinda religio estas reprezentataj de la Sankta Triunuo simbole : BRAMO 1-a forto kreanta, ŜIVAO 2-a forto pasiva (ĉi tie detruanta) kaj VIŜNUO la 3-a forto ekvilibriga (ĉi tie konservanta) aŭ reciproka subtenado de ĉio ekzistanta.

En la kristana religio ni trovas la samon, rilate la kosmon. La tiel nomata Sankta Triunuo estas : la PATRO (forto aktiva), nome Dio; la FILO (forto pasiva, nome la kreaĵo aŭ fizika universo, kaj la Sankta Spirito (3-a forto rilatiga) nome, la reciproka subtenado de ĉio ekzistanta. La 3a forto rilatigas Dion kun Lia kreaĵo.

RILATE LA HOMON : Se ni aplikas la leĝon de la 3 fortoj al la homo, ni havas : 1-a forto : La spirita majstro (Jesuo) - la Patro - ; 2a forto : La disĉiplo - la Filo - ; kaj inter ambaŭ manifestiĝas la 3a forto : la esotera instruo Evangelia (kiun la majstro instruas al siaj disĉiploj).

ALDONE al ĉi tio, kiam oni diras, ke Dio kreis la homon laŭ sia bildo kaj simileco, oni konstatas ke ankaŭ la homo estas triunuo, ĉar oni aludas al la 3 aspektoj, centroj aŭ naturoj (INTELEKTA, FIZIKA kaj EMOCIA) de l'homo, kiuj similas al tiuj de la Absoluto, kiu posedas tiujn 3 aspektojn : SPIRITON, MATERIAN MANIFESTIĜON kaj UNIVERSALAN AMON (reciprokan subtenadon).

MIRAKLOJ NE EBLAS

La volo de l'Absoluto manifestiĝas nur en la mondo 3, en kiu ĝi kreas ĝeneralan planon de la cetera universo kiu de tie pluen disvolviĝas meĥanike nur sub la formo de meĥanikaj leĝoj. Se la Absoluto volus manifesti Sian volon, ekz-e, en nia mondo (Mondo 48 : la Tero), en opono al la meĥanikaj leĝoj regantaj ĝin, Li devus detru ĉiujn mondojn troviĝantajn inter Li mem kaj nia mondo (nome, la mondojn 3, 6 12 kaj 24). Tial, la ideo de miraklo en la senco de perforto de leĝoj fare de la volo de l'Absoluto, oponas ne nur al la

ordinara saĝo, sed ankaŭ al la ideo mem de volo.

La volo de l'Absoluto ne povas manifestiĝi perfortante ĉi tiujn leĝojn.

KONKLUDE : La REKTA influo de l'Absoluto ne atingas la homon, kiu vivas submetita je 48 leĝoj. (Sed por la homo ekzistas la ebleco liberiĝi laŭgrade de la meĥanikaj leĝoj studante kaj observante ilin en si mem!

Alidirite, la Absoluto ne povas agi kontraŭ sia propra volo, same kiel Li ne povus gajni kontraŭ atuta aso per ordinara duo (Tio estus malobei la lud-leĝojn, kaj tiukaze la ludo jam ne estus tia!) aŭ same kiel Li ne povas fari ke 2 plus 2 ne estu 4. Kaj tamen, en siaj preĝoj, kredanto petas miraklon : li petas esence ion neblan, ekvivalentan je : "Dio, faru ke 2 plus 2 ne estu 4!"

KELKAJ INDIVIDUAJ CELOJ

(el la 6a ĉapitro)

1) Ekzisti post la morto. 2) Koni la estontecon. 3) Kompreni la doktrinon de Kristo kaj esti vera kristano. 4) Scii kiel ĉesigi la militojn. 5) Povi helpi aliajn homojn. 6) Esti la mastro de si mem.

1) Por ekzisti post la morto la homo devas ESTI. Se en li estas nenio kio povas rezisti la eksterajn influojn, tiam nenio en li povas rezisti la morton de l'fizika korpo. La homo devas disvolvi permanentan MION por transvivi la morton de l'fizika korpo.

2) Kio okazas aŭ povas okazi al ni dependas de unu aŭ alia el ĉi tiuj tri kaŭzoj : akcidento, destino, aŭ nia propra volo. Tiaj, kiaj ni estas, ni troviĝas preskaŭ tute sub la LEĜO DE L' AKCIDENTO.

3) Tiaj, kiaj ni estas, ni ne povas esti veraj kristanoj. Kristo diris : "Amu viajn malamikojn!", sed kiel ami niajn malamikojn, se ni eĉ niajn amikojn ne povas ami? Por esti vera kristano, unue oni devas esti. ESTI signifas : Esti la mastro de si mem; ĉar se homo ne estas la mastro de si mem, li ne povas esti vera kristano; li estas nur maŝino, aŭtomata roboto, submetita je la leĝo de l'akcidento.

4) Militojn oni ne povas ĉesigi. Pacista grupo kiu volus ĉesigi militojn, devus militi kontraŭ militemuloj. La homoj estas tio kio ili estas kaj ne povas esti malsamaj. Unue ili devus ŝanĝi la eston.

5) Por povi helpi aliajn homojn, unue oni devas lerni helpi sin mem.

6) El ĉiuj individuaj celoj la plej bona estas ĉi tiu : ESTI LA MASTRO DE SI MEM. Sen ĝi, ĉion ceteran oni ne povas atingi! Unue, la homo devas liberiĝi de la karcero de si mem, kaj tiucele li devas koni sin, kaj por koni sin li devas studi la funkciojn de sia maŝino.

KONU VIN MEM

Por studi sin mem oni devas scii kiel studi sin: La fundamenta metodo estas OBSERVI SIN MEM, nome, observi la funkciojn de siaj centroj. Estas 2 formoj de memobservado :

KONSTATO : Registri en la menso tion observatan.

ANALIZO : De kio ĝi dependas, kial ĝi okazas ?

Unue ni devas limiĝi je la OBSERVO kaj la KONSTATO, ĉar la ANALIZO necesigas koni ĉiujn funkciojn kaj la leĝojn kiuj regas ilin. Ĉiu funkcio estas regata de sia propra "cerbo" aŭ "centro". Estas 3 funkcioj : PENSO, SENTO, SENSACO.

La funkcio de l'penso ĉiam komparas aŭ rezonas (intelekta konkludo rezultas el komparo inter du aŭ pli da impresoj).

La sentoj kaj la sensacoj ne komparas, ne rezonas. La sentoj estas ĉiam agrablaj aŭ malagrablaj; ne estas indifereantaj sentoj; kontraŭe la sensacoj, krom agrablaj aŭ malagrablaj, povas esti ankaŭ indifereantaj, nome, nek agrablaj nek malagrablaj, nek varma nek malvarma. (Blanka folio, ruĝa krajono : en la sensaco de l'blanko kaj de l'ruĝo estas nenio agrabla aŭ malagrabla). Tre ofta eraro estas nomi la sensacojn sentoj. (Ekz.: mi sentas malvarmon, anst. : mi sensacas malvarmon!).

Iuj personoj perceptas precipe per la pensoj, aliaj tra la sentoj, kaj aliaj per la sensacoj; ĉi tiuj diferencoj en la perceptado kaj la reagado al la eksteraj eventoj kaŭzas ke la homoj ne interkomprenas nek komprenas sin mem. Kaj tial la plej kompletan komprenon pri donita temo oni atingas ekzamenante ĝin samtempe tra niaj pensoj, sentoj kaj sensacoj.

Konklude : Por observi sin mem, oni devas distingi la funkciojn, kaj poste rilatigi la impresojn al la responda kategorio.

MISFUNKCIADO DE LA CENTROJ

La centroj klopodas anstataŭi unu la alian. Kiam la motora centro faras la laboron de l'intelekta centro, rezultas mekanika legado aŭ mekanika aŭdado (oni atentis ion

alian!); la intelekta centro estas distrata de la revado aŭ imagado. Revado kaj imagado estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de misfunkciado de la centroj. La motora kaj emocia centroj emas revadi kaj uzas la intelektan centron, kiu ĉiam pretas por tiu celo, kaj tial cedas al ili sian lokon.

EKZERCOJ POR LA CENTROJ

POR LA MOTORA CENTRO : Por studi la kutimojn, observi kaj konstati ilin la homo devas batali kontraŭ ili. (Kiel li piediras, kiumaniere li mangas, ktp) kaj klopodi fari tion alimaniere, ekzemple, se li mangas tre rapide, fari tion pli malrapide; se li piediras tro malrapide, fari tion iom pli rapide, ktp, ktp.

POR LA EMOCIA CENTRO : Batali kontraŭ la esprimado de malagrablaj sentoj. Multaj homoj trovas malfacile eviti esprimi siajn sentojn pri la malbona vetero, aŭ kiam la ordo aŭ la justeco (tiaj, kiajn ili konceptas ilin) estis objekto de atenco aŭ perforto.

Batalante kontraŭ niaj kutimoj, ni konstatos ke niaj pensoj, sentoj, sensacoj, agoj kaj vortoj estas la rezulto de eksteraj influoj; ke ni estas regataj de eksteraj cirkonstancoj; ke ni estas aŭtomatoj; ni konstatos nian kompletan mekanikecon (RIMARKO de la kompilinto : Ni estas kvazaŭ zombioj!*); kaj ke ni ne posedas eĉ unu solan permanentan funkcion, eĉ unu solan permanentan staton!

La homo, de kiam li komencas observadi sin laŭ adekvata maniero, per ĉi tio mem komencas ŝanĝi sin kaj li jam ne povas esti kontenta pri si. La studado de l'emocioj kaj la laboro pri l'emocioj estas fundamentaj.

Identaj agoj povas havi sian originon en malsamaj centroj, ekz. : Rekruto kaj malnova soldato manipulas pafilon; la unua faras tion per la intelekta centro; la dua, per la motora centro, kiu faras tion multe pli bone!

* GLOSOJ necesaj ĉar neregistritaj en PIV ! :

ZOMBIO : En la vuduismo de Hajtio, homa kadavro revivigita per sorĉa ago, kun ŝajna vivo, sen kun fakuloj por aŭtomate plenumi homajn aktivecojn.

VUDUO : Kreo kaj sistemo de sorĉado kiu devenas de afrikanaj kultoj Aŝantaj.

AŜANTOJ : Indianoj de Aŝantio, nuntempa Ganao.

Resume kompilis : ERGOTO DE BONAERO.



laŭtaj informoj

EN PARIZO, spaco AUSTERLITZ
30a kajo de Austerlitz, 75013 PARIS

de la 24a de februaro
ĝis la 1-a de marto 1989

Salono pri
ALIA SANO

de la 4a ĝis la 12a de marto 1989 :

Salono :
ALIMANIERE labori kaj vivi

Evento en Parizo : dum 9 tagoj kun ekologia vilaĝo kun 200 eksponantoj pri biologia agrikulturo, alternativaj entreprenoj, renovigeblaj energioj, manlaboristaĵoj, tria-mondo, malsamaj lernejoj, ekologiaj vilaĝoj, aliaj ferioj, alternativoj pri ekonomio, pri homaj rilatoj, pri la kunviveco kaj festo, spektakloj, animadoj, filmoj, ekspozicioj, prelegoj, laborejoj...

Ĉiutage de la 12a ĝis la 22a (dimanĉe : de la 10a ĝis la 20a)
Enirprezo : 20 F. Konstanta prezo : 60 F. Infanoj : senpaga.
Dokumentoj disponeblas en la franca, nederlanda, germana kaj esperanta.

Organizas : APODALE, centre écologique du Fraysse,
F 46170 CASTELNAU MONTRATIER

En PERPIGNAN

La ĝenerala asembleo de la Kultura E-Centro en Perpignan okazis la 29an de septembro je la 17a en nia Sidejo.

Post kelkaj vortoj pri la agado de la pasinta jaro, oni diskutis pri la organizado de la kursoj : lunde : konversacia kurso ; marde : perfektiga kurso : ĵaŭde : radio-kurso ĉe Fréquence-Sud 98.8 Mhz en Argelès-sur-Mer dum unu horo 19h-20h. Tiu kurso konsistas el du partoj : unue 30 minutoj da kurso pri esperanto ; due : 30 minutoj da muziko kaj babilado en esp. Por la unua grado oni faros petan kurson kiel la homo deziras.

La Ĝenerala Asembleo aprobas novan nomon de la sidejo : Kultura Centro de la Orientaj Pireneoj por Esperanto

EKZISTAS PARTIO

kiu aspiras esti transnacia aŭ ne ekzisti;
kiu aspiras esti la Partio **reprezentanta**
vicon, rajton, ne-perforton
aŭ ne ekzisti ;
esti Partio kapabla transiri landlimojn,
partiojn, naciajn ŝtatojn
aŭ ne ekzisti.

EKZISTAS PARTIO

kiu uzas ne-perfortajn metodojn **por**
faligi vandojn, transiri limojn, tranĉi
dornodratojn, formovi buŝostopilojn, kaj
plenigi la silenton per kiu milionoj da
homoj ĉirkaŭigis sin ;

PARTIO

kiu batalas por justeco, por libero, kaj por la libera
cirkulado de homoj kaj de ideoj, por la defendo de la
ekologia sistem, **en mondo** superregata de la oferego
de malsato tie, kie la egaj ekonomiaj kaj armilprodukt-
antaj potencoj estas liberaj agadi kiel al ili plaĉas.

EKZISTAS PARTIO

kiu elektis la transnacion alternativon,
kiu kontestis samtempe la internacion kaj propran
strukturojn

ESTAS PARTIO

kiu ne partoprenas en la elektoj en iu ajn
lando

LIBERA PARTIO

kiu unuigas kaj fokusas sur la simplaj sed
fortaj "sociaj bezonoj"

preta bonvenigi iun ajn kiu, en iu ajn parto
de la mondo, havas en sia poŝo iun ajn specon de nacipartia
aliĝokarto, ne forĵetante iun ajn ulon pro kialoj pri raso,
religia kredo, aŭ ideologio.

Tiu ĉi estas partio al kiu indas aliĝi. Aliĝu al **Radikala**

Partio. Petu pliajn informojn al :

"ESPERANTO" RADIKALA ASOCIO - RADIKALA PARTIO

V. di Torre Argentina 18, I - 00156 ROMA (Italio)

RAPORTO PRI LA INAŬGURO DE STRATO ESPERANTO EN EYSINES (Girondio, Francio)

La 5an de junio, okazis en EYSINES inaŭguro de strato ESPERANTO, situanta en nova kvartalo. Malgraŭ la balotoj, kiuj malhelpis ĉeesti al multaj geamikoj, sep dekoj da personoj partoprenis, inter kiuj du urbaj konsilantoj, reprezentantoj de diversaj fakoj de la Laika Amikaro kaj voj-borduloj.

Okaze de la honorvino, donacita de la municipo kaj servita surloke, plenaere, ni transdonis 538 gratulleterojn senditajn el 24 landoj.

Laŭ la vortoj de la urbestro, strato ESPERANTO estos "montrofenestro" por la internacia lingvo.

Krom la ĝirondiaj esperantistoj, ĉeestis amikoj el Bergerac, Le Fleix, Mont de Marsan, Pau.

Ni estis speciale feliĉaj, ke pola amikino Barbara, kiu restadis ĉe Annie dum tri semajnoj, estis inter ni tiukaze ; ankaŭ amikino el Tours, kiu konatiĝis kun Barbara kaj Annie kaj Gisèle en Grésillon, pasintjare.

Ni kore dankas ĉiujn, kiuj helpis nin diversmaniere, sendante gratulleterojn al la urbestro, kuraĝigajn leterojn al ni, konigante nian peton per ripetaj artikoloj en ĵurnaloj, kaj partoprenante la inaŭguron malgraŭ la jam cititaj balotoj kaj la malproksimeco.

EYSINES : Raporto pri la kunveno de 14 Sept.88

La 14an de septembro, en "Domo de la Asocioj", la fako kunvenis. Ĉeestis 14 personoj, inter kiuj 3 novaj. Tri aliaj petis senkulpigon. Laŭ la tagordo, oni pritraktis jenajn temojn :

- organizo de la kursoj : ĉi-jare estas 3 niveloj kaj intensa kurso.
- novaj eblecoj por propagandi. Pluraj gazetoj volonte eldonas niajn informojn, ankaŭ radioelsendiloj.

Loka radiostacio, kun kiu ni jam kontaktis, petis, ke ni faru komunan elsendon. Grupeto laboras por tio.

Ni havos informbudon ĉe loka bazar, kun novaj informpaneloj.

Pro la informo de JORGOS, venigi dana esp. artistinon, la grupo konsentas.

Montserrat informis pri sia agado ĉe Casa de Goya en BORDEAUX.

Temas pri alveno de hispana profesorino por prelego pri esperanto. Ni atendas respondon. Montserrat raportis ankaŭ pri la Kongreso en Valencio.

La radioelsendo de B. Vincent, ĉe FRANCE-INTER, interesis multajn personojn. Ĉiuj el ni aŭdis bonajn komentojn pri tio, kaj pluraj novaj ge-lernantoj venis al ni post aŭdado de tiu elsendo kaj nia anonco ĉe lokaj radioj.

London, la 12an de sept., ni akceptis S-ron R. BORE en CHAMBERY, kiu vojaĝis tra Francio por foti panelojn "Strato aŭ skvaro Esperanto aŭ Zamenhof". Post telefonado de S-ro BORE, ge-DEMONTOUX informis nin

kaj kune ni akceptis S-ron BORE, kiu fotis la koncernan panelon. Posttagmeze ni iris en CENON kaj LORMONT por foti la panelojn.

Okaze de la kunveno, ni gustumis bonan blankan vinon el Savojo, ricevititan de la vojaĝanta amiko. Tiu vino bone akompanis kukojn faritajn de Montserrat. Dankon al vi, geamikoj!

Ĉe la BICIKLEMULOJ

B.E.M.I. : BICIKLISTA ESPERANTISTA MOVADO INTERNACIA
Fondita en 1980. Celoj : diskonigi Esperanton en la biciklemularo(n) kaj disfamigi biciklemon en la Esperantistaro.

Membreblas per jarkotizo por lerno-jaro 88/89 :

30 NOK al pĉk 2 67 22 85 ĉe BEMI-kasistino, M. LUND, Pareliusvn 7 C N-1177 OSLO 11. (Tiel riceveblas sesmonata BEMI-Revuo)

aŭ 30 FF al pĉk: JORGOS ESPERANTO CCP 7856 76 U LYON (Tiel riceveblas BEMI-Revuo kaj pliaj informoj pri/por francaj membroj.)

Ĉefa jarkunsido en Internacia Junulara Kongreso de TEJO, en kiu BEMI estas unua faka sekcio.

Sed BEMI membras ankaŭ, kiel "internacia" ĉe E.C.F./E.F.B. (European Cyclist Federation - Eŭropa Federacio de Biciklemuloj) kaj ĉiuj esperantistaj biciklemuloj bonvenate membriĝu sen limoj je aĝo, sekso, lingvo-nivelo, profesio, politika emo, religia kredo,... eĉ financ-povo...

kaj BEMI-kunvenoj okazu en ĉiu E-aranĝo kaj iom post iom en ĉiu biciklo-aranĝo.

UNUAPAŜE PLEJ GRAVAS INFORM(IĜ)EMO !!!

De julio 88 prezidas BEMI-n : Tamas SLEZAK el Oroszlany (H), por ĝi sekretarias Yvonne DERKSEN el Maastricht (NL), kasas Marianne LUND el Oslo/Tromso (N), ĝian revuon redaktas Sander van HUIZEN el Nijmegen (NL) kaj el ĝiaj komisionoj la vojplana/mapa por 89-aj karavanoj* kunordigatas de Jean-Marc VERGER, Lavilletterte, F 60240 CHAUMONT EN VEXIN.

* el Katalunio, Jugoslavio, Norvegio al Kerkrade (NL)-I.J.K kaj Brighton-U.K. kaj eventuale aliaj E-aranĝoj. Informu... frue...!

Dankas pro via atento kaj esperante favorajn reagojn kore salutas via
JORGOS.


Jenaj broŝuroj, elĉerpitaj ĉe SAT-BS, restas plu haveblaj ĉe B.Schneider,
38 av. de la République, F 94320 THIAIS :

* Individuismo en antikveco (Han Riner) 4 FF

* Ĉu armeo aŭ civila neperforta defendo? 5 FF

* Leĝpropono por unuflanka malarmigo de Francio 0,50 FF

(aldoni la afrankon!)



Semajnfino en "Carque Sac"

Dum la longa semajnfino de la 11-a ĝis la 13-a de novembro, deko da gejunuloj kaj du infanoj restadis en la muelejo de Carque Sac.

Kribo kaj Solange plezure akceptis nin ĉiujn por iom subteni sian ne ĉiam

agrablan laboregon.

La muelejo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo pli kaj pli viveblas, tamen restas ankoraŭ multo por fari.

La suno brilis, kiam la laboremuloj alvenis vendredon tagmeze. Post la komuna preparado de la manĝo kaj ĝia ĝuado, ni tuj levis la manikojn por eklabori. Ni dividis nin en 3 grupojn : unu grupo forportis tegolojn malnovajn, dua grupo ordigis novajn lignobretojn kaj aliaj kuraĝuloj tondis kaj bruligis herbaĉojn apud la rivereto. Tio ne malhelpis, ke unu el ni tiom intense laboris, forgesinte ĉion, kio lin ĉirkaŭis, eĉ falis en la rivereton. Kompatindulo, li devis elteni multajn ridojn kaj mokojn, tamen ne malbonintencajn.

Post laboro venis malsato. Por la viandmanĝemuloj, Solange proponis anseraĵon. La vesperon ni finis babilante kaj ridante en la muelejo ĉirkaŭ kameno.

La morgaŭa tago denove montris al ni sian belan flankon. Milda vetero kaj sunbrilo, kiuj permesis al ni eĉ manĝi ekstere kaj despli agrabligis la laboron. La fortaj karakteruloj kuraĝis grimpi en la subtegmentejon por komenci liberigi ĝin je diversajoj. Poste ili komencis prilabori la tegmenton, kiun pli-malpli detruis strigo, elŝirinte la tutan vitrolanon.

Dume, la aliaj helpis al Kribo prepari broŝuron. La vespero same agrable finiĝis kiel la antaŭa. Lacaj kaj feliĉaj ĉiuj endormiĝis.

Dimanĉon, la lastan tagon, la vetero ne plu tiom favoris. Ĉiuj pli-malpli lacis. La vetero pensigis nin, tranĉi lignaĵon por porti poste al la kameno. Jes, oni devas pensi pri vintro, kiu baldaŭ alvenos. Posttagmeze ĉiuj disiĝis, promesinte baldaŭ reveni.

Ursula.

Belga muelejo malfermiĝas al Esperanto

Se vi deziras scii pli pri la celoj, aktivecoj kaj novaj projektoj de la asocio **Mondhejmo**,

se vi deziras iel partopreni la komunan konstruon de venontaj renkontoj,

se vi deziras malkovri promes-riĉan lokon, kiu povos iĝi nova esperanta rendevuejo,

MONDHEJMO bonvenigas vin okaze de sia ĝenerala asembleo.

Loko : La muelejo de Hermeton, route de Givet 68,
B - 5540 HASTIÈRE-LAVALAUX, Belgio

Datoj : La aranĝo funkcios de la 27-a ĝis la 31-a de decembro ; eblas ĉeesti nur parton.

Programo : farota de la partoprenontoj mem.

Prefere sin anonci antaŭe ĉe :

^{au} Mondhejmo, 9 av. de Verdun, F 60200 COMPIEGNE
Nikolin' PAIROUX, rue St Luc, 35 - B - 5004 NAMUR

EKZEMPLODONA AGADO EN LIMOĜIO

S-ro Raymond GUEGUEN, aŭtoro de la franclingva priesperanta informbroŝuro (vd. L! 78 p.66) transsendis al **Laŭte!** kopion de dosiero pri sia oktobra agado favore al diskonigo de Esp-o en departemento Alta-Vienio (Francio). R. Gueguen plenumis vere ekzemplodonan laboron, vere indan je disfamigo.

Unuapaŝe, li provizis la Urban Bibliotekon de Limoĝo per diversaj libroj kaj dokumentoj franclingvaj pri Esperanto kaj la problemo de L.I. ĝenerale. Poste, pri la ebleco konsulti tiun dokumentaron en la Biblioteko li informis diversajn instancojn de la departemento (Centre Information Jeunesse du Limousin, Rectorat de Limoges, CRKDP, CDDP, FOL de la tri departementoj pri kiuj zorgas la rektoro, la akademia inspektoro).

Samtempe la regiona gazetaro raportis pri la afero.

E-kunveno okazas ĉiun ĵaŭdon je 18h30 en F.O.L. de Alta Vienio, 44 cours Gay-Lussac, en Limoĝo.

Por interesatoj, adreso de S-ro GUEGUEN :

Rés. Jeanne d'Arc, 4D rue des Soeurs de la Rivière, 87000 LIMOGES.

EUROKKA



Esperanto-Rok'Asocio
F-31450 DONNEVILLE
Tel: 61-81-95-65

...Ni agadas aŭ provas agadi per kaj pri Esperanto-Rok' grupoj.

Ni serĉas iliajn materialojn (diskojn, kasedojn, gazetdosierojn, fotojn, ktp).

Per tiu materialo ni disaŭdigas Esperanto-Rok'programojn ĉe la Tuluza Roka Radio-Stacio F.M.R. (89 Mhz) kaj ni provas starigi reton por diskonigi tiujn grupojn tra Eŭropo.

Ĉiuj Esperanto-Rok'grupoj interesas nin, sed kompreneble ni devas atenti pri ilia bonkvalito; tio povas helpi ilin por ke ili klopodu pliboniĝi.

Kiam ni parolas pri Esperanto-Rokmuziko, tio signifas ke estas Rokmuziko kun la kantoj en Esperanto. Por ni la Rokmuziko estas tre larĝa kaj enhavas multege da stiloj : Rokenrolo, Punko, Regeo, Soulo, Bluso, Kontrio, Ritmenbluso, Metalroko, Ĵazroko, Tropikaj muzikoj, Popo, Folkroko ktp. Preskaŭ ĉiuj elektraj muzikoj.

Nuntempe la ĉefa laboro de EUROKKA estas starigi kaj organizi kontaktan sliparon, en kiu troviĝas Esperanto-Rok'grupoj kun sia materialo, Esperanto-asocioj kaj neesperanto-asocioj kiuj pretas kunlabori kun EUROKKA.

Nun estas la komenco kaj kompreneble, estas malmultaj kontaktoj, sed ni esperas, ke post kelkaj monatoj ni povos jam komenci ion konkretan; ekzemple koncertojn, turneojn kaj interŝanĝojn.

Ankaŭ ni bone rilatas kun la internaciaj Radio-stacioj, kiuj elsendas E-programojn ; ili povos ege helpi nin, kiam ni bezonos ilian subtenon por diskonigi la Esperanto-Rok'grupojn.

Pri la diskonigo de Esperanto en niaj lokaj kaj naciaj neesperanto-Rokmovadoj, la plej bona solvo estas : montri al ili ke Esperanto vivas en la Rokmovado, ke ĝi ekzistas kaj funkcias, kaj ke esperantistoj ĉiam pretas instrui esperanton por helpi eventualajn novajn alvenantojn al Esp-o.

Ĉu tio interesas vin? Ĉu vi estas preta(j) eniri nian sliparon por eventuale partopreni la Eŭropan Esperanto-Rok' Reton?

Se jes, ĉu vi povos helpi EUROKKA por serĉi Esperanto-Rok'grupojn kaj asociojn, kiuj pretus iam organizi ion?

Ĉu vi havas aliajn kontaktojn en aliaj landoj?

Ĉu vi povas helpi EUROKKA por diskonigi ĝin kaj iliajn celojn en via lando? Ĉu vi povus alvoki la Esperanto-Rok'grupojn pere de Radio-stacioj kaj gazetoj (eĉ neesperantistaj), kiuj estas aŭskultataj kaj legataj de la Rokmovado, gejunuloj kaj esperantistoj? **Se** vi sukcesus aperigi iun ajn artikolon, ĉu vi povus sendi ĝin por niaj arkivoj kaj gazetdosiero? (eĉ se ne en esperanto).

Tiu afero gravas por la diskonigo de Esperanto inter la gejunuloj kaj por la disvastigo de la Esperanto-Rok'grupoj...

La Respondeculo de EUROKKA
Floréal MARTORELL.

Laŭtuloj verkas kaj eldonas...

Amiko J.S. Brilleaud ("Janseb") verkis kaj eldonis 28-paĝan broŝuron **"L'Espéranto revient à la mode"**. Humurplena, ilustrita per kelkaj trafaj desegnoj de la aŭtoro, multe malpli teda ol multaj similintencaj, tiu broŝuro estas bona ekzemplo pri iniciatoj, kiujn nun kapablas havi kaj realigi lokaj E-kluboj, eĉ unuopuloj, por pli moderne prezenti la varon "esperanto" al la nuntempa publiko.

Nura damaĝo estas, ke la litertipoj estas maldikegaj (simile al tiuj, per kiuj la freneza tajpanto de Laŭte nun tajpas ĉi tion...) kaj do eble ne de ĉiuj facile legeblaj.

Por ricevi ĝin (sed estas tre eta eldonkvanto) sin turni al :

Association Esperanto de Rueil, 1 bis rue Paul Gimont,
F 92500 RUEIL MALMAISON.

En Bulgario :

La 10a Nacia Poŝtista E-Konferenco

De la 23a ĝis la 25a de sept.1988 okazis la 10a konferenco de la Poŝtista kaj Telekomunikista E-sekcio ĉe Bulgara E-Asocio. La konferenco estis dediĉita al la 20-jara jubileo de la sekcio fondita en 1968 en Varna.

La programo konsistis el raportoj, prelegoj, projekciado de diazitivaj kaj video-filmo, ekskursoj ĝis la pitoreska urbo Smoljan, la montara ripozejo "Pamporovo" kaj la arkitektura rezervejo vilaĝo Siroka Laka.

Partoprenis gekolegoj el la tuta lando kaj gastoj el Finnlando, Sovet-unio kaj Francio. La konferenco estis unu el la plej grandaj aranĝoj de la Bulgara Poŝtista kaj Telekomunikista E-Sekcio en la jaro kaj restos neforgeseblaj memoroj por la partoprenintoj.

(resume kompilis laŭ komuniko : Kribo)



adreso :

CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS
F 47340 LAROQUE TIMBAUT

poŝtkonto :

CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS
3371 74 M BORDEAUX

La jarkolekto 1988 estas preta
kaj konsistas el :

Joseph ROTH
(tr. Tarsen Regis)

LA RIBELO

(romano, 98 p.)

Viktoro HUGO
(tr. VALO)

LEGENDO
pri la bela Pekopeno
kaj la bela Boldura

(70 p.)

Frederi MISTRAL
(tr. R. Laval)

LA POEMO
DE
RODANO

(136 p.)

Suma valoro : 63 FF
Por abonantoj de la serio, *
inkluzive de la afranko :

... nur 50,40 FF

Plus, por franclingvanoj :

LENTAIGNE
GRAMMAIRE
& ESPERANTO
(Eléments de grammaire
pour non-initiés)

(24 p.)

Suma valoro : 68 FF
Por abonantoj, inkluzive
de la afranko :

... nur 54,40 FF

* Vidu la abonkondiĉojn dorsflanke.

Kiel funkcias la broŝurservo ?

Krom la gazeto **Laŭte!**, Amika E-Rondo Aĝenia eldonas broŝurojn por propra broŝura serio, por la Broŝurservo de SAT aŭ aliaj personoj aŭ asocioj.

ELDONADO

* **En la kadro de SAT-Broŝurservo/Laŭte!** : La broŝuroj de ĉi tiu serio estas eldonataj iel kooperative per propra kaso de SAT-BS/L! Ili estas mendeblaj rekte al la BS aŭ al la kunlaborantaj libroservoj, aŭ riceveblaj aŭtomate per abono (vd. poste).

* **Por aliaj personoj aŭ asocioj** : La aŭtoro/tradukinto pagas mem la eldonadon kaj mem zorgas pri disvendado de sia broŝuro.

Se la enhavo de la broŝuro tion pravigas, parton de la eldonkvanto povas pagi kaj disvendi mem la broŝurservo, enigante la broŝuron en la serion ricevotan i.a. de broŝurabonantoj kaj de kutimaj kunlaborantaj libroservoj.

MENDOJ AL LA BROŜURSERVO

La prezoj, en francaj frankoj, inkluzivas la afrankon por minimume 120-franka mendo. Por malpli ol 120-franka mendo : aldoni 20% aŭ pagi la realan afrankon post ricevo de fakturo.

Libroservoj, plurjaraj abonantoj de L! (monprovizantoj A) kaj broŝurabonantoj (monprovizantoj B) rajtas 20% da rabato kiam ili mendas por almenaŭ 120 FF.

ABONO AL LA BROŜURA SERIO / LAŬTE!

Kiu deziras ricevi aŭtomate **Laŭte!** kaj, kun 20%-rabato, ĉiujn novajn broŝurojn kaj tiel kontribui al bona plufunkciado de la afero, tiu monprovizuro per almenaŭ 120 FF. La abono validos ĝis elĉerpiĝo de la monprovizo. Pri la stato de sia "konto" la monprovizanto ricevas informon ĉiun jarfinon kaj ĉe baldaŭa elĉerpiĝo. Ne-reprovizado signifas aŭtomatan rezignon de la abono.

EN LA ELDONPROJEKTOJ :

- * Charles BUCHOWSKI "Kie brulas, ĝentlemanoj?"
- * Slanina, Šmidrkalová. Esperanto per INTER-metodo
- * B. TRAVEN, La Mortula Ŝipo
- * R. LAVAL, Faux amis, faux parents, etc...
- * L.A. PERAIRE, Tra la mondo per biciklo (reeldono)

Elĉerpitaĵ estas : Varsovio 1887, Laborista Esperantismo, Fronte al la Vivo, Komuna Kantareto, Imaga dialogo Marks/Bakunin, L'Esperanto en 24 paĝines, Esperanto de poche... plus la titoloj menciitaj p.12 de la katalogo 1987.

NUN DISPONEBLAJ BROŜUROJ (dec.1988)

LISTO DE SAT-BROŜURSERVO (12.88)

Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj)	Prezo en FF
AA. La Aperoĵ de Ahasvero (Han Riner)	20
AL. Alvokoj al la homa konscienco (APJR)	6
AN. Nia angorplena socio (Milan Šimečka)	3
AO. Anarkio kaj organizo (Malatesta)	4
AP. Amo per proverboj (Azevedo)	1,50
AR. Argentina Novelaro (18 noveloj)	20
BA. Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)	20
BP. Legendo pri la bela Pekopeno (V.Hugo)	15
BU. La racia kaj ateista budhismo	4
ĈI. Ekologio : ĉu ideologio ? (W. Gunther)	3
ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti)	6
DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio	25
DU. Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario)	3
EA. Esperanto in 24 pages (angla)	1
EH. Esperanto en 24 paĝinas (hispana)	3
EI. Esperanto su 24 pagine (itala)	3
EL. Elekto de tekstoj de Bakunin	10
ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin)	12
ET. Etiko I (Kropotkin)	12
EV. Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti)	4
FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo	4
FE. Esprimaro Franca-Esperanta (Bourgeois)	45
FI. Laŭ la fluo de l'interparolo (Bourgeois) Esp./Fr.	8
FZ. Filozofio Zoologia (Lamarck)	20
GE. Abrégé de grammaire esp-o (Lentaigne)	7
GR. Grammaire & Esperanto (Lentaigne)	5
HP. Humanitaristaj Principoj (Eugen Relgis)	3
IE. Initiation à l'Esperanto (An Kaŭ)	5
IM. Individuista Manlibreto (Han Riner)	4
IN. Individualisma socialismo de A.R.Protschowsky	2
JA. Jaro 2000 (H. Muller) disdona ekonomio	30
KD. La Krimoj de Dio (Sébastien Faure)	4
KE. La Kvina Evangelio (Han Riner)	15
KF. Kontraŭflue (Valo)	10
KI. El la kara infaneco... (Valo)	12
KP. Katastrofplano pri Fessenheim + Wyhl	5
LA. Lingvaj Anguloj (Baronnet)	8
LK. La Konflikto (Le Dantek)	
+ Dubi (Alain) tr. Lanti	20

LL. Leteroj de Lanti (ĝis 1937)	45
LM. La Mondo ne havas atendejon (Dekker)	15
LN. Linguistique et non-violence (Masson)	2
LR. La Ribelo (Joseph Roth) romano	18
ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon)	4
MN. Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre)	6
MS. Memvola Servuto (La Boétie)	4
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)	10
NE. Naciismo kaj Esperantismo (S.Aarse)	8
NC. Naciismo (Lanti)	12
NI. Nia Individuismo (E. Armand)	4
NL. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak)	3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman)	35
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktoj)	15
PF. Proverbaro Franca/Esperanta + Esprimoj sankciitaj de l'uzado (Bourgeois)	12
PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval)	3
PN. Politika Neperforto (M.A.N.)	8
PR. La Poemo de Rodano (Frederi Mistral)	30
PS. Psikotransformismo (Ergoto de Bonaero)	4
PT. Piramido de l' Tiranismo (Domela Nieuwenhuis)	3
RA. Revolucia registaro. Pariza Komuno (Kropotkin)	6
RO. Rompoj (A.Jacquard)	4
SA. Kio estas SAT? (H.Masson)	3
SJ. Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo)	12
SN. Sveda Novelaro	30
SR. Les 16 règles commentées (R.Laval)	3
SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek)	4
TD. Tiel diru! (Lentaigne) supl. de DI por francoj	25
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano	20
US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak)	3
VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts)	10
VI. Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner)	20
VL1. Verkoj de Lanti 1. (Adamaĵoj, Absolutismo, Herezulo, Herezaĵo)	20
VL2. Verkoj de Lanti 2. (3 semajnojn en Rusio Tro Plena Gramatiko, Diskutejo, Epiloge)	20
VL3. Verkoj de Lanti 3. (Artikoloj, paroladoj kaj ekstraktoj el leteroj de 1937 ĝis 1946)	20
VO. Vortoj de Kamarado E. Lanti	20
VT. El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!)	7
ZH. La Zamenhofa Homaranismo (A. Caubel)	4

ĜIES VOĜO

ABSOLUTA KALUMNIO..

La artikolo de Bernard AUNIS "Malkoloniado" (L:78, p.36) estas absoluta kalumnio.

Plej bona respondo estas en artikolo de Michel Bernard "Morgaŭ Kanakio" en franclingva gazeto "Silence", el kiu mi tradukas parton :

Respekto al la Ne-kanakoj

"...Post la buĉado de Hienghène, endas noti, ke Jean-Marie Djibaou, kies du fratoj estis ĵus murditaj, analizis la eventon nur politike, sen troiga pasio. Mi ne certas, ĉu multaj estus agintaj same.

Post la buĉado en Ouvéa la Kanakoj ne mortigis la ostagojn, kvankam la batalo daŭris pli ol ses horojn, kaj kvankam pafado per mitraletoj sufiĉus por tio. Estis vunditaj en la groto nur la ĝendarmoj trafitaj de siaj kolegoj ekstere lokitaj.

Kiam okazas intertraktado sur politika tereno la Kanakoj ĉiam respektas la Kaldoŝojn, kiujn ili nomas "viktimoj de la historio", agnoskante la samajn rajtojn al tiuj, kiuj naskiĝis en la insulo. En sia referendum-propeno ili agnoskas al la Kaldoŝoj, kiuj naskiĝis sur la insulo, la rajton partopreni en la decido.

Same, kiam oni demandas ilin pri estro teco de Kanakio, ili neniam aludas pri eligo de iu ajn, escepte de la militistoj..." ktp.

Ĉu ne stranga la malsimileco inter la du artikoloj ?

L. ANGEVIN

SILENCE, 4 rue Bodin, F 69001 LYON - jam informis pri Esp-o en siaj numeroj 91 kaj 93.

PRI SKANDALO

En Francio la filmo "Lasta tento de Kristo" kaŭzas grandan skandalon. Kiu estas kulpa en tiu afero ?

Ni memoru principon : la libereco de iu finiĝas tie, kie

komenciĝas alies libereco.

Ĉu oni estas libera bojkoti filmon, kiun oni ne ŝatas - eĉ ne vidinte ĝin? - Jes.

Ĉu oni rajtas instigi aliajn ĝin same bojkoti? - Jes.

Ĉu oni rajtas perforte malhelpi aliajn, kiuj deziras ĝin vidi? - Ne !

Mu, kion faras tiuj kredantoj, kiuj sin sentas ofenditaj en sia kredo per tiu filmo? Ili ĵetas larmigajn grenadojn (de kie ili ricevis ilin?), damaĝas kinejojn, detruas, bruligas ilin : jen estas la efikoj de religia maltoleremo kaj fanatikeco. Lasu fanatikajn religianojn libere manifestacii sur la stratoj, baldaŭ vi vidos la Inkvizicion renaskiĝi en moderna formo. Ĝi ja ne plu posedas la leĝan potencon, sed ĝi praktikas la potencon de furiozaj amasoj, en la nomo de sankta libereco. Se la veraj liberamantoj ne amase kaj forte reagos, baldaŭ ili perdos ĉian liberecon. Ni memoru, ke per tiaj brutalaj metodoj trudiĝis en iuj landoj la faŝistaj aŭ aliaj diktatoroj. Neniam libero estas definitive konkerita : ĝia posedo kaj ĝuo necesigas senĉesan bataladon.

VALO (Oktobro 1988)

ILI DAŬRIGAS

Ili, kiuj ? Nu, tiuj maltoleremaj, kiuj volas trudi sian opinion al ĉiuj. Perforte, kiel la Inkviziciistoj de la Mezepoko, kies indaj heredantoj ili estas.

Antaŭ kelkaj tagoj, ili malhelpis la prezentadon de filmo laŭ ili "blasfeman"; sekvis detruo de kinejoj per frakaso, per bruligo, kun kelkaj senkulpaĵaj vunditoj. Nun (fine de oktobro), ili sin turnis per telefonaj minacoj kaj anonimaj leteroj kontraŭ la liberan vendadon de abortiga pilolo. Tiam ministro kuraĝe reagis, rememorigante, ke en Francio, de 1975, propravola aborto estas leĝe permesita. La alia kuraĝa ministro, kiu tiam iniciatis kaj adoptigis tiun leĝon, estas S-ino Simone Veil, kiu estas nek socialista nek anarkista. Ŝi tamen estas juda, kaj eble tio estas sufiĉa "krimo" en la juĝo de tiuj perfortemuloj, kiuj estas parencoj de la hitleranoj almenaŭ per siaj agmetodoj.

Ĉu ducent jarojn post la Deklaracio de la rajtoj de la homo kaj civitano ni permesos, ke ili daktu sian volon en la respubliko?

En 1787 Rabaut-St Etienne, kun helpo de La Fayette kaj de ministro Malessherbes, persvadis la reĝon, tiam absoluta aŭtokrato, subskribi "Edikton de tolero" favore al protest-

antoj kaj al ĉiuj ne-katolikoj. Post tiu unua sukceso, li ne ĉesis luktaĉi por ĉiaj kaj ĉiuj liberoj, ĝis sia morto per la gilotino de la diktatora Teroro*. Li restu ekzemplo por ĉiuj liberamantoj. Ni ne forgesu, ke la defendo de la homaj rajtoj estas senfina batalado.

VALO

* Pri Rabaut-St Etienne probable aperos artikolo en *Sennacieca Revuo* 1989.

RIMARKIGOJ post lego de L! 78 RIPOSTO AL MALBONAERULOJ

Karuloj,

pardonu, ke mi foje ankoraŭ uzas, resp. aplikas (unu el tiaj duoblaĵoj abomenindaj laŭ Malbonaero), Esperanton Maljunan, pri kio mi ne plu kutimas depost la ekesto de Esperanto Moderna. Sed ĉar vi rifuzas presi alion ol E.Malj. (kurte: Maljon) malgraŭ ke E.Moderna estas legebla kaj komprenebla al ĉu komencanto ĉu progresinto de Maljo (E.Malj) kun escepto de la ĝismedolaj Esperantistoj, kiuj agas laŭ la deviz' "kio ne rajtas esti, tio ne eblas esti", tial mi ja devas almontiri. (por Malbonaero: tio estas aludo al la proverbo: Se la monto ne venas al Mohamedo, Mohamedo ja devas almontiri).

Se iu multe parolas pri morto, povas esti, ke li-ŝi estas malsana. Ŝajnas al mi, ke Maljo mortantas, restas nur eble ankoraŭ 200-500 Esperantistoj inter la "kartotekaj kadavroj", kiuj nombras je ĉ. mil, kaj la resto estas silento. La Morto-serio en "Laŭte" vere povas timigi onin pri la grado alta de morbo via.

Ĉiu morto, ankaŭ tiu de Esperanto Maljuna, donas ankaŭ esperigon: nome kiam Maljo mortis, povas releviĝi Esperanto Moderna en renaskiĝo. Do la postmorta vivo de Esperanto Maljuna povas konsisti en unue silento kaj "Oblivjo" (rivero de la forges!), due reapero de tre parenca, simila infan' aŭ nepino kun iuj aliaj genoj, kiel tio estas en la natur'. Grandkvanto de la antaŭaj genoj restas, sed envenas novaj precipe ankaŭ pro la spertaro akumulita de la antaŭaj vivoj de l'patro, patrino kaj de l'geavoj. La renaskita, do postmorta, Esperanto iom post iom retrovas sian memon, ĝoje konstatante tamen ke iuj lambastonoj antaŭaj ne plu bezonas esti portataj.

Kun malŝarĝo de l'brusto li-ŝi ankaŭ rimarkas, ke li-ŝi pli malpeze povas moviĝi kaj ke li-ŝi estas pli riĉa. Tio almenaŭ estas la kaz', kiam la gepatroj/geavoj interedziĝis ne kun drinkuloj aŭ krimuloj ks. kaj ne faris tro da krimoj. Precipe malbonaj estus en nia kaz' krimoj kontraŭ la etimologio kaj la lingvistiko... Ekzemple estas iuj drinkuloj en Maljo, kiuj

pensas, ke etimologio nur povas tuŝi Esperanton (Maljon) rilate kun "fremdvortoj" kaj lingvistiko nur se kadranta en la "Fundamento" de Maljo... Tiu banalismo malbonaera ne estas aprobinda geno. Ĉar ĉio strebas alsupre, la renaskita Esperanto enhavos ankaŭ iomete pli da precizo foje, post kiam pro la ban' en Oblivjo la "fundamentismo" forfalis, forlaviĝis jam. Cetere Zamenhof mem, en kies person' centriĝas la kulto ĉirkaŭ iu "Fundamento", sen kiu la senvertebruloj ne kapblas iri, iam skribis sub pseŭdonim' "Unue!", ke Esperanto ankoraŭ longe ne estas lingvo kompleta, finita, sed ankaŭ evoluos, ke lia form' de Esperanto (Lingvo Internacia) ne estas la lasta vorto en la afero. (krude resumite). Kaj mi povas aldoni, ke oni devis komenci, kaj oni ne komencas per io komplika; tial de la genio de Zamenhof neniam elfalas krenel' de la kron', ankaŭ se Maljo unue devas morti por povi renaskiĝi... La mister' de Dio, Alaho, Elohim, Adonajo, Aton, aŭ kiun ajn nomon "li" havis, ne estas rivelita tute en la Skriboj Sanktaj, pri la meĥanismo de renaskiĝo nenio estas dirita, eble prave, tuj venus sciencistoj por ĝin "plibonigi"... Kaj kian ĥaŭson tja plibonigistoj faradas, ja estas konate... Do postmorta vivo jam delonge ekzistas en la natur', kiel ĉiu biologo konas, per la reviviĝo en la idaro kaj neparo kaj alia parenkaro postsekva. "Sed, ho, kie estas la 'mio' ? iuj diras, precipe malbonaeruloj, kiuj volas preni kun si en la tombon la ĉapelojn diakritejn de Maljo kaj la malitajn adjektivojn ktp., por savi ilin en la tombo por la vivo postmorta, kiel provis la faraonoj egiptaj per siaj amataj ĉevaloj kaj servistoj en form' de figuraro. Nu, tiu kara "Mio" estas ĉiam nur efemera, ekzistanta nur por la momento cele al unucentrigo de l' mova kaj decida aparato de l' besto, futur' ne ekzistas, ĉar ĝi ja ankoraŭ ne okazis, pri ĝi oni povas nur dedukti kaj antaŭsupoz-nebuli, kaj la pasinto ĵus okazis, pri ĝi enestas nur rememoroj en la diversaj storejoj, kie la Mio nur rolas same kiel iuj aliaj gravaj uloj rakontitaj, storitaj. Do la Mio estas abnorme trotaksita de la senmortemuloj. Kaj krome ekzistas storejo transmateria tre granda, tuthomara, la t.n. "antroj de l' memor' universa".

Tiel almenaŭ estas unu el la tradukoj el la Biblio. Sed kiu scias, kiam rekonsciĝas la Mioj, aŭ ĉu ne pli vere ĝi estas ĉiam sentempa, nur apartena al la infinitezima sendaŭro de l' momento; kaj kiu scias, ĉu ne plej vere, ĉiuj Mioj estas nur unu Mio, unu Memo, unu tutmonda nome, kaj ni nur ne rimarkas ĝin tiel longe kiel ni pensas nian propran mion io aparta, forgesante, ke en la sama momento ĝi regas ankaŭ en nia proksimul' ; tiel longe kiel ni dispartigas nin, disizolante nin malamikante aŭ supereme, ni malĝuste vivas kaj certe agos nekonforme kun la vera motor' de l' evolucio psiĥa kiel de l' evolucio universa. Tiel ankaŭ estas la afero kun la lingvoj kaj precipe kun Esperanto : En ĝi post unua inico far Zamenhof multaj kontribuis, sed neniu rajtis devii de la baz', sed ĝuste tio, se vidi pli longajn tempojn, estas necesa en naturaj procedoj de evoluoj kaj plibon-

igo : ĝi okazas kun la aliaj lingvoj post katastrofoj por la popol', kaj tiam aperas tute novaj ekoj en tiu lingvo. Estas, ĉar ĝi renaskiĝas. El la latina renaskiĝis la lingvo itala, el la helena la greka hodiaŭa, ktp. El la inka-lingvo la hodiaŭa keĉua... Esperanto ne povas eviti tiun veran evoluadon. Grave tamen estas, ke la sopir' al internacia lingvo bona por ĉiuj ne mortos, ke la homoj restas homoj strebantaj, tiam ankaŭ la renaskiĝo de Esp-o, transformiĝinta el "Maljo" ekzemple en Esperanton Modernan, estas afero sekura...

H. Dito Goeres

* Noto de la red. : Duan parton de tiu kontribuo kaj aliajn artikolojn de H. Dito Goeres L.-red. ricevis sed ne publikigos pro jena kialo : Ĉar la legantaro de L! (escepte ĝuste de H.D.G.) abonas ĝin por legi ĝian "Esperanton Maljunan", - pro respekto al tiu deziro, la redaktanto sentas nek la rajton nek la emon tajpi tekstojn tro plenajn de al tiu Esperanto fremdaj vortoj. Se, eventuale, inter la Laŭtularo troviĝas interesiĝantoj pri la "Esperanto Moderna" de H.Dito Goeres, tiuj bonvolu rekte rilati kun li :

Versener Str. 123, D-4050 Mönchengladbach.

Kribo.

ESPERANTO-GIRONDE

Nova rekordo kronas nian sesan staĝon : pli ol 65 partoprenantoj vizitis nin en Artigues (22.23/10/88) : 6 diversaj studgrupoj kaj distra vespero animata de la staĝanoj mem per skeĉoj, ludoj, dancoj kaj kantoj. Gratulojn al Janina Petrov kaj ŝia akordiono, al Henri Ménard kaj lia saksofono, al Jean-Marc Leclerc kaj lia gitaro, kaj dankojn al ĉiuj animantoj.

Fine de oktobro Jorgos trabiciklis Ĝirondion. Akceptite en Ste Foy-la-Gde, Cenon kaj Eysines, li verkigis artikolojn en la loka gazeto.

Dum nia lasta kunveno (8/11/88) ni akceptis prezidant-inon de la Interaga Universitato de Bordojo, kiu "postulas" E-kurson en la Eŭropo-Domo : jen ido de la somera sukceso de Brigitte Vincent.

Tiam ni ricevis tre interesan universitatan taskon de du junulinoj el la sociologia fakto de Bordeaux III, kiuj lastjare elektis E-on, kiel temon por sia jardosiero.

Nia kasistino afable, diskrete, delikate memorigas... ke ŝi daŭre akceptas viajn kotizojn.

Niaj venontaj rendezuoj :

En Marcenais (26/11/88) je la 14h30 diskuttemo : pri ekologio kaj la apuda atomcentralo de Braud-St-Louis. Ni tiam ankaŭ festos la trian datrevenon de Sabrina (memprenparitaj kukoj estas bonvenaj).

En Cenon-Palmer (6/11/88 je la 19h) : grupkunveno.

Zamenhof-tago en Montauban (10.11/12/88) vidu detal-ojn alipaĝe.

En Cenon-Palmer (10/01/89 je la 19h) : grupkunveno.

En Artigues (28.29/01/89) : E-semajnfino. Viajn aliĝil-ojn al tiu staĝo vi sendu prefere al :

Marcela kaj Henriko COURBIN, Le Roux, BONNETAN,
33370 TRESSES.

Marcelo.

Mesaĝo de la eldonanto :

Ĉar, dank'al kunlaboro de kelkaj gejunuloj, ĵus pretiĝis la du lastaj broŝuroj por la eldonprogramo de 1988, la sendado de la ĉi-jara kolekto okazos tre baldaŭ, nepre antaŭ la jarfino.

Interesatoj, kiuj ne estas ankoraŭ broŝurabonantoj, povos ricevi tiun kolekton kun 20%-rabato, monprovizante per almenaŭ 120 FF, ekzemple okaze de sia reabono al **Laŭte!** por la venonta(j) jaro(j). (Abono por 1989 : 40 FF ; por la jaroj 1989 Kaj 1990 : 80 FF).

Memorigendas, ke "monprovizanto" estas abonanto, kiu sendas minimume 120 FF por ricevi dum pluraj jaroj :

* nur **Laŭte!** (monprovizanto A)

* **Laŭte!** + la novaĵojn de la Broŝurservo (monprovizanto B).

La monprovizantoj ĝuas 20-procentan rabaton por siaj broŝurmendoj, kiam ilia mendo atingas 120 FF.

La venonta n-ro de L! aperos fine de januaro, kun i.a. debato pri "Komercaj aplikoj de Esp-o", la kutimaj rubrikoj kaj, se loko tion ebligos, eseo "La antaŭvenantoj de Anarkismo" de E. ARMAND (trad. D.C.).

Ĉiu bonvolu atenti la ĉi-suban "staton" de sia(j) abono(j) al **Laŭte!** kaj al la broŝura serio, plenumu konsekvence la jarfinan pag-ceremonion, kaj, kun trankvila konscienco, ĝuu plej agrablajn festojn !

Kribo.

VIA SITUACIO

Via abono
al L! estas

registrita ĝis

finita
dec.89

En via BS/L!-konto

Restas : **42** FF.

Mankas :